

Julio - aŭgusto 1969

62-a jaro

n-ro 764-5 (7-8)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



Ernest Jovanis

Vi trovos

sur la sekvantaj paĝoj, inter la plej freŝaj novaĵoj, iom da prokrastitaj, sed ne malpli legindaj materialoj: sur p. 113 detalojn pri la rusa lingvo ĉe UN, kaj sur la mezaj paĝoj la verkojn, kiuj venkis en la poeziaj branĉoj de la Belartaj Konkursoj en Madrid. Kvankam jam en januaro ni anoncis la decidon de Unuiĝintaj Nacioj, akcepti la rusan kiel plian laboran lingvon, kaj promesis, ke "detaloj sekvos", la kribrado de detaloj el la preskaŭ du-kilogramma dokumentaro (nur pri tiuj debatoj) estas laboro temporaba.

Enhavo

- 113 UN: Kiom da lingvoj? (Informoj de CED)
- 114 Franca komunumo
- 114 Paco nun el Moskvo
- 114 La kongreso de IFEF: 500 en Avignon
- 115 Tokio pensigas la skoltojn
- 115 Haazen kolektas muzikistojn
- 116 Grava bezono: Didaktika literaturo (Lienhardt)
- 119 Kion skribis la gazetaro en 1968? (Becker)
- 120 La knabo Ellezer (Porat/Ginz)
- 120 Lampiroj (Rossi, Belartaj Konkursoj 1968)
- 122 La korvo (Poe/Knoedt, Belartaj Konkursoj 1968)
- 124 Religia neŭtraleco de UEA (Carlén)
- 124 Leteroj de legantoj
- 125 Recenzoj
- 125 Nekrologo Donald E. Parrish
- 126 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj)
- 126 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 127 Progresas la Enciklopedio (Hauptenthal/Lins)
- 128 La Juna Vivo
- 129 Esperanto en radio
- 130 Kalendaro por julio-januaro
- 130 Elokvento (citaĵo)
- 130 Provu imiti la nov-zelandanojn (poŝtmarkoj)
- 131 Oficiala informilo n-ro 425: UEA heredas pli
- 131 Anoncetoj

La kovrilo

Franz Jonas, Alta Protektanto de la 55a Universala Kongreso de Esperanto (Vieno 1-8 aŭgusto 1970), estis mem iam aktivulo de la aŭstra Esperanto-movado kaj flue parolas la Internacian Lingvon. Li unue laboris kiel kompostisto, servis ĉe la rusa kaj itala frontoj en la Unua Monda Milito kaj okupis oficon en la Aŭstra Socialista Partio en 1932. En 1935 li estis arestita, kaj dum la Dua Milito li laboris en lokomotiva fabriko. Dum la postmilitaj jaroj li laŭgrade atingis ĉiam pli gravajn funkciojn en sia partio kaj en la administrado. Li estis urbestro de Vieno de 1951 ĝis 1965 kaj fariĝis prezidanto de Aŭstrujo en 1965.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Redaktoro: D-ro V. Sadler.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 25,— gld.). Unuopa ekzemplero: 1,— gld.

Banko: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Girkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano por diskonigo de la agado de UEA: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

Estrarano pri turismo: S-ro M. Jaumotte, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

Estrarano pri lernejoj: S-ro J. Toczyski, skr. p. 57, Gdansk 1, Polujo.

Estrarano pri financoj: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

UN: Kiom da lingvoj?

Informoj de CED

La 21an de decembro, 1968, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj akceptis la rusan lingvon kiel plian laboran lingvon. Tiun rangon havis jam la angla kaj franca lingvoj de post 1946, la hispana de post 1948. El la kvin oficialaj lingvoj de UN, nur la ĉina ankoraŭ ne havas la rangon de labora lingvo.

Kion signifas la decido? Sur la kampo de interpretado ĝi praktike ne ŝanĝas la situacion, ĉar jam de longe okazas samtempa interpretado en ĉiuj oficialaj lingvoj. Tiurilate, do, la kvin lingvoj havas egalan rangon. La distingo inter oficialaj kaj laboraj lingvoj sentiĝas ĉefe en la sfero de dokumentado: estonte devos aperi en la rusa, same kiel jam en la angla, franca kaj hispana, kompleta dokumentaro de la Ĝenerala Asembleo, sen ia prokrasto en rilato al la aliaj lingvoj. En la ĉina, kiel nur-oficiala lingvo, plue aperos nur resuma dokumentaro, ofte nur post longa prokrasto. La ekstra kosto por la rusa lingvo estas taksita je \$ 453 000,— por la unua jaro, nur por la Ĝenerala Asembleo.

La 24an de januaro 1969, la Konsilo de Sekureco sekvis la ekzemplon de la Ĝenerala Asembleo, akceptante tiel la rusan kiel ankaŭ la hispanan kiel laborajn lingvojn. Tiun rangon havis en la Konsilo nur la angla kaj franca antaŭ tiu dato. La decido estis unuanima. La Ĝenerala Sekretario (U Thant) taksis la ekstrajn kostojn je ĉ. \$ 399 300,— por la unua jaro.

Klopodo de la ĉina delegacio akceptigi ankaŭ la ĉinan kiel laboran lingvon de la Asembleo kaj la Konsilo malsukcesis, gajninte nur la voĉojn de Gvineo, Filipinoj kaj Ruando. Dum finiĝis per venko por la franca lingvo la debatoj fine de 1967, la luktoj en la nova sesio do finiĝis, resume, per gravaj sukcesoj por la hispana kaj rusa lingvoj, je suma kosto por UN de ĉ. \$ 852 300,— jare.

Kien kondukos fine tiu tendeco al ĉiam pli multaj oficialaj kaj laboraj lingvoj en la organoj de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj aliaj organizaĵoj? Ĉu fine necesos eldoni la ampleksan dokumentaron de UN (jam 600 000 000 paĝoj nur en 1967) en ĉiuj lingvoj de ĉiuj Ŝtatoj-Membroj? Aŭ ĉu la tuta administra sistemo fine paneos pro la malebleco trovi sufiĉe da interpretistoj kaj tradukistoj por la miloj da kunvenoj, kiuj ĉiujare okazas sub la egido de UN?

Analizo de la lastaj debatoj, kiel ankaŭ de la tuta lingva situacio en Unuiĝintaj Nacioj, jam aperis en "La Monda Lingvo-Problemo".¹ Ĉi tie ni nur citas kelkajn el la ĉefaj argumentoj, kiuj povos influi la estontan evoluon.

Kio devus esti la ĉefa kriterio por decidi, ĉu iu lingvo fariĝu oficiala aŭ labora? Laŭ la Ĝenerala Sekretario de UN: unuavice la nombro de Ŝtatoj-Membroj, kiuj uzas ĝin. Sed U Thant mem agnoskis, ke "ne ekzistas ia ĝenerale akceptebla klasigo de

la Ŝtatoj laŭ lingvoj" — kaj, efektive, ekestis disputo inter Usono (kiu asertis, ke nur 4 Ŝtatoj uzas la rusan) kaj Soveta Unio (kiu pretendis, ke la nombro estas multe pli granda). Laŭ aliaj, gravas la nombro de parolantoj. La ĉina delegacio proponis doni al la ĉina lingvo egalan rangon, ĉar "uzas ĝin pli da homoj, ol kiun ajn alian lingvon de la mondo". Laŭ la soveta delegito, ludas rolon la fakto, ke "la rusa jam efektive fariĝis internacia lingvo", ke oni parolas ĝin "ne nur en tiu ĉi mondo, sed ankaŭ en la kosmo". Laŭ s-ro Malik, gravas la rolo de la koncerna(j) lando(j) en politiko, scienco kaj kulturo. Necesus akcepti la rusan, por ke UN "ne laboru ĉefe en lingvoj de la kolonia epoko", por "plibonigi la ekvilibron en la agado de UN", kaj por ke "ruslingvanoj povu plene partopreni la laboron sen lingvaj baroj". Tio "stimulus interesigon pri la rusaj lingvo kaj kulturo".

Multaj delegitoj parolis pri justeco, pri egalaj rajtoj de la lingvoj (oficialaj). Ne temas pri favoroj por la rusa lingvo, sed nur pri egaleco. Aliflanke, kiel la norvega delegito atentigis, malgrandaj popoloj devas oferi sian lingvon en UN kaj, laŭ li, "aliaj lingvaj grupoj" povus fari same. La akcepto de la rusa "ne helpas Ŝtatojn, kies lingvoj ne estas uzataj en UN". Aliaj delegacioj menciis la kontinentan aspekton: Filipinoj "volus vidi azian lingvon egalranga kun la kvar aliaj oficialaj lingvoj, kiuj estas eŭropdevenaj". Gvineo atentigis, ke "neniu el la lingvoj diskutataj estas afrika; neniue afrika Ŝtato estas vere franclingva, anglalingva aŭ hispanlingva".

La ĉefaj argumentoj kontraŭ la pliigo de la laboraj lingvoj estis financaj kaj praktikaj. Usono atentigis, ke la fina kosto povus atingi \$ 5 milionojn jare nur por la rusa, se aliaj organoj sekvos la ekzemplon de la Ĝenerala Asembleo. Krome, "estos fine maleble rifuzi ankaŭ al la ĉina la saman rangon".

La teknikaj problemoj fariĝas nesupereblaj. Ankoraŭ ne aperis la finaj protokoloj de la pasintjara sesio, pro la manko de fortoj por tradukado. Ankoraŭ neniue protokolo de la Konsilo de Sekureco de 1967 estis eĉ nur traktita. Ĉu neniue vidas elirejon? Tamen du delegitoj — la hispana kaj brita — tuis la temon de internacia lingvo. Ni citu la vortojn de Sir Leslie Glass (Britujo): "Eble iam, lasante flanken la fieron pri la naciaj lingvoj, ni ĉiuj lernos unu komunan duan lingvon. Se la popoloj povus interkomuniki per unu internacia lingvo, tiam estus preskaŭ nenio, kion la homaro ne povus atingi." Jen vortoj iel konataj....

1. LMLP vol. 1, n-ro 2, p. 87-106. La aliaj citaĵoj kaj informoj aperas en dokumentoj de UN A/ 7334, 7359, A/C 5/SR.1281-1290, S/8977, S/PV.1463 kaj S/RES/263.



Tuta armeo da Instrulistoj helpas disvastigi la francan lingvon en la landoj de la "Franca Komunumo" — unuavice la eks-koloniaj landoj de Afriko kaj Azio. Jen vjetnamo instruas al afrikano. Kiel aliaj naciaj lingvoj, ankaŭ la franca ludas gravan rolon kiel helplingvo en internaciaj rilatoj. Sed daŭre akriĝas la rivaleco inter tiuj lingvoj, kiuj aspiras tian rolon... (Foto: Unesko/Dominique Roger)

Paco nun el Moskvo

FRANCA KOMUNUMO

Nova signo de la kreskanta rezisto de franclingvaj landoj kontraŭ la internacia superrego de la angla estis la fondo de organizaĵo de la franclingva komunumo. La inaŭgura sesio de la nova Francolingva Komunumo okazis en la ĉefurbo de Nigero, Okcidenta Afriko, en februaro. Ĝi decidis starigi konstantan plenum-organon aŭ sekretariaton.

Laŭ prezidento de Nigero Diori Hamani, kiu faris la inaŭguran paroladon, la Komunumo "rifuzas ĉion, kio povus aspekti kiel ia kultura imperiismo". Li tamen opiniis, ke ekzistas ia rilato inter la esenca karaktero de la franca lingvo kaj la idealo de libereco. La delegito de Senegalio asertis, ke la franca lingvo estas "admirinda instrumento por ekvilibro, harmonio kaj progreso je la servo de tiuj popoloj, kiuj adaptiĝis al reciproka interkompreniĝo."

La inaŭguran sesion en Niamey ĉeestis ankaŭ delegitaro el Kanado.

Signifa paŝo en la historio de la soveta Esperanto-movado estas la ĵusa apero de la unua soveta eldono de la revuo "Paco", organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Kiel konate, tiu revuo aperas ĉiufoje en alia lando. La soveta kajero estas bele presita kaj ilustrita, grandformata kaj 46-paĝa.

Kiel aldono al la sama numero de "Paco" aperis presita broŝuro 52-paĝa, enhavanta raporton kaj paroladon de L. I. Breĵnev.

La eldonaĵoj estas signifaj precipe en tio, ke ili prezentas transiron de la soveta aplikado de Esperanto sur teknike pli altan ŝtupon. Kiel pli frue raportite, sovetaĵoj de post la Dua Monda Milito eldonis nur sporade lernolibrojn aŭ vortarojn de Esperanto. En Esperanto aperis nur multobligitaj aŭ ofsetitaj materialoj, tute ne rimarkindaj. Nur lastatempe, kaj nur en la baltaj respublikoj, aperis iom da presitaj broŝuroj en la Internacia Lingvo. Per la aperigo de soveta eldono de "Paco" kaj la akompana broŝuro, Moskvo mem nun akcelas tiun tendencon al pli inda prezento de siaj inform-materialoj en Esperanto.

La kongreso de IFEF : 500 en Avignon

Ke la fervojistoj kongresas dum majo, tion klarigas la fakto, ke ili estas dum la vojaĝsezono bezonataj por transporti aliajn vojaĝantojn. Nur tiel eblas kongresigi pli ol 500 el la 2600 membroj de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kiel ĉi-jare en Avignon en suda Francujo. IFEF estas la plej granda el la fakaj asocioj ĝis nun aliĝintaj al UEA.

La sukceson de la kongreso certigis diligentaj preparlaboroj de LKK (kun help-komitato en Parizo), kaj ĝustatempa gazetara konferenco kun bone preparita informa materialo same garantilis pozitivan raportadon ĉe la gazetaro. La ĉeesto, en la solena malfermo, de reprezentantoj de franca kaj internacia fervojistaj organizaĵoj kaj de reprezentanto de la ĝenerala direktoro de la franca fervojo estas same kalkulenda al la sukcesoj de la informado.

Kiel tradicie en la kongresoj de IFEF, la kultura

flanko de la kongreso estis same riĉa, kiel la faka. Elstaris teatra vespero, koncerto kaj folkloro vespero.

Landa sekcio en Rumanujo

El la decidoj de la labora plenkunsido eble plej signifa estis la akcepto de nove fondita landa fervojista asocio en Rumanujo — lando, kie ĝis nun ne prosperis (de post la monda milito) ia organizita Esperanto-movado en landa skalo. La venonta kongreso de IFEF okazos en Rimini, Italujo, dum por 1971 estis provizore elektita Ljubljana. La kongreso aŭdis, ke post la ekzemplo de Germanujo ankaŭ la norvegaj kaj hungaraj fervojistoj eldonis jam fervojfakan terminaron kun proksimume po 2000 terminoj. Kompletigis la programon faka prelego kaj vizito al lokomotivejo.

TOKIO PENSIGAS LA SKOLTOJN

Jam aperis la speciala lernolibro de Esperanto por skoltoj, lanĉita de Skolta Esperantista Ligo kun financa helpo de UEA kaj aliaj instancoj. (Vidu "La Juna Vivo", aprilo, p. 72). Jam per sia titolo — Jamborea Lingvo — la libro montriĝas trafe adaptita al la skolta pensmaniero. La sukcesoj de la eksperimenta uzo de Esperanto en la pasintjara jamboreo en Britujo kuraĝigis SEL prezenti Esperanton kiel LA jamborean lingvon. Se tiu koncepto povos vere enradikiĝi ĉe la skolta junularo, la perspektivoj estos tre larĝaj.

Stilo Szilágyi-Setälä

La lernolibro, verkita de SEL-sekretario J. K. Hammer (Nederlando), estas rekta-metoda, iasence posteulo de la renomaj lernolibroj de Szilágyi kaj Setälä. Plenstopita per desegnaĵoj pri skoltaj aferoj, ĝi prezentas sin al la legantoj per antaŭparolo en la angla, franca, germana, hispana kaj — anticipe al la 13a Monda Skolta Jamboreo en Japanujo en 1971 — ankaŭ en la japana.

La "Adopta Plano"

La ĉefaj klopodoj de SEL en la nuna stadio konsistas el la t.n. "Adopta Plano", laŭ kiu individuoj, lokaj grupoj, landaj asocioj k.a. estas instigitaj "adopti" lokajn skoltajn grupojn, donaci al ili la specialan lernolibron kaj ĉiumaniere helpi al ili lerni Esperanton antaŭ la Jamboreo en Tokio. Jam nun la Plano bone antaŭeniras, kaj diversaj ne-Esperantaj skoltaj centroj rekomendas la lernolibron al siaj membroj. La kompreno, ke en Japanujo ne eblas elturniĝi per kelkaj balbutaj frazoj en unu el la eŭropaj lingvoj, ŝajne penetris finfine en la kapojn de skoltestroj okcidentaj. La momento estas certe favora por bone preparita kampanjo, kaj ĉiu, kiu pretas kunlabori, povas mendi la lernolibron "Jamborea Lingvo" ĉe la Libroservo de UEA (po 2,50 gld. + sendokostoj) aŭ rekte turni sin al SEL, ĉe J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando. SEL aparte petas ne kontakti kun skoltaj instancoj antaŭ ol unue informi s-ron Hammer.

Jo Haazen kolektas muzikistojn

Jo Haazen (jen kun la edzino Imelda) havas ambiciajn projektojn por muzik-amantoj

Muzika estas la vivo de Jo Haazen, la juna fakdelegito de UEA en Antverpeno. En siaj fruaj dudekaj jaroj, li jam tenas la oficon de Urba Karilono de la urbo Antverpeno. Ludi 20-tunan sonorilaron, regatan per pugno- kaj piedo-klavoj, tute ne estas nura "ludo". Ke karilono estas ankaŭ koncerta instrumento de alta rango, tion pruvas, ekzemple, la stereofona disko, kiu aperis pasintjare kun 4-lingva (ankaŭ Esperanta) teksto kovrila: "Jo Haazen bespeelt de beiaard van Antwerpen" (Decca 193.461). En sia fako li jam plurfoje gajnis la unuan premion de Internaciaj konkursoj.

Nun Jo Haazen elpaŝas kun nova iniciato, kiun li delonge kovis: Internacia Orkestro. La ideo estas: kunigi la multajn personojn, kiuj scipovas ne nur paroli la Internacian Lingvon Esperanto sed ankaŭ praktikas la parte internacian lingvon de la muziko. La Internacia Orkestro — tiel argumentas Haazen — povus doni publikajn koncertojn okaze de kongresoj kaj similaj renkontiĝoj kaj tiel kontribui al la prestiĝo de la Internacia Lingvo en kulturaj medioj.

Formale, la Orkestro jam ekzistas. Ĝi estis fondita en januaro 1969, kaj ĝiajn aferojn jam energie gvidas s-ro Haazen el la sekretariejo ĉe Lijnwaadmarkt 11, Antverpeno. Sed li ankoraŭ serĉas muzikistojn: 5 unuajn violonistojn, 5 duajn violonistojn, 4 aldviolonistojn, 3 violonĉelistojn, 1 kontrabasiston kaj 1 pianiston. La serĉon malfaciligas la altaj kriterioj: nur tiuj, kiuj povas pruvigi sian kapablon per konservatoriaj diplomoj aŭ aliaj dokumentoj, estas akcepteblaj. Sed Jo Haazen scias, kion li volas, kaj havas la energion necesan por ĝin atingi.



Ne ekzistas gvidanto de Esperanto-kurso, kiu ne sopiris al pli vasta elekto de uzeblaj legaĵoj por la kursanoj. Kvankam en la lastaj jaroj la nombro de libretoj por infanoj kaj komencantoj relative kreskis, malofte la enhavo estas kontentiga el pedagogia vidpunkto. Dume, multaj naciaj lingvoj proponas al siaj lernantoj amason da zorge preparitaj legaĵoj. Albert Lienhardt proponas sisteman agadon por forigi tiun kontraston.



Grava bezono:

Didaktika literaturo

en Esperanto simpla kaj facile komprenebla

Post la kurso

Kiam finiĝas Esperanto-kurso por komencantoj, la kurs-gvidanto troviĝas antaŭ la jena problemo: Per kiuj konvenaj rimedoj la disiĝantaj novuloj nun plu-lernu la lingvon?

Pri tiu demando, certaj legantoj, kiuj lerte kaj sperte praktikas la Internacian Lingvon jam de multaj jaroj, eble skuos la kapon, kaj respondos: "Tio ne estas problemo. Sufiĉas atentigi la kursanojn pri taŭgaj gazetoj, libroj, parol-diskoj kaj son-bendoj. Ekzistas je amaso da ili!"

Al tiu demando, ŝajne definitiva, oni devas repliki la jenon: Jes, fakte, ekzistas nun-tempe relative multaj tiaj rimedoj. Sed tuj stariĝas alia demando: Kiuj, el ili, estas vere taŭgaj, t.e. plene kaj ĉiu-rilate taŭgaj, por ebligi al la novuloj progresi **kiel eble plej facile** sur la longa vojo al perfekta lingvo-scio?

Pri lingvo-lernado per legado

Antaŭ ol serĉi respondon al tiu dua demando, estas cel-serve iom paroli pri la utileco de legado en lingvo-lernado.

Ĉiu ajn scias, ke ju pli multe oni legas, des pli funde oni lernas lingvon.

Estas konate, ke leg-avidaj infanoj kaj junuloj akiras multe pli grandan sci-povon pri sia nacia lingvo, ol ne-legemaj. Por kontentigi la ĉiu-landan leg-bezonon, la nacilingvaj libro-merkatoj proponas milojn da diversaj gazetetoj, leg-kajeroj, broŝuroj, libroj kaj albumoj, gradigitaj laŭ la respektiva lingvo-nivelo de la legantoj, t.e. laŭ ties respektiva aĝo. Oni trovas abundajn legaĵojn plej diversajn por infanoj de 6 ĝis 8 jaroj, de 8 ĝis 10, de 10 ĝis 12, k.t.p. El tiu situacio rezultas, ke homo, kiu, dum sia jun-aĝo, legis meze po du libroj monate, estas leginta — post dek jaroj — pli ol 200

librojn! Sed, se iu legis eble nur 100 librojn — aŭ eĉ nur 50 — li (aŭ ŝi) tamen povis iom-post-iome pli-riĉigi sian lingvo-scion, laŭ maniero plej praktika, interesa, agrabla, facila kaj efika.

Esploro kaj rezulto

Ni nun revenu al nia dua demando, ĉi-supra.


Por fari, al si, klaran kaj ĝustan opinion, necesas unue tra-legi atente, **kun okuloj kvazaŭ de novulo**, la tutan disponeblan lego-materialon por Esperanto-lernantoj, unua-vice la tiel nomatajn "lego-librojn".

Objektiva kaj funda esploro montras

- ke la nombro de disponeblaj legolibroj, en Esperanto, estas relative malgranda;
- ke libroj kun legaĵoj zorge gradigitaj (laŭ la lingvo-nivelo de la lernantoj) preskaŭ ne ekzistas;
- ke nur tre malmultaj el la legaĵoj en tiuj legolibroj estas **entute** tiel simplaj kaj facile kompreneblaj, kiel ili devus esti, por povi plenumi la fiksitajn kondiĉojn. Ili do ne ebligas, al novuloj, progresi **kun kiel eble plej malmulta peno** sur la vojo al lingva perfektigo.

La rezulto de tiu esploro klare vidigas larĝan breĉon en la tamen tre ampleksa Esperanto-literaturo, precipe en la literaturo didaktika. Estas konjekteble, ke tiu breĉo kulpas grand-skale pri la sen-kuraĝiĝo de multaj kursanoj, pri la sen-Interesiĝo de multaj plu-lernantoj, kaj pri la kreskanta apatio de multaj el niaj membroj — en aliaj vortoj: pri la ne-sufiĉe rapida progreso de nia movado.

Se ni disponus pri nur kelk-deko da diversaj legolibroj alte interesaj, aktualecaj, vivantaj kaj modernaj, verkitaj en Esperanto laŭeble simpla, komun-uza kaj facil-komprenebla, estus multe pli



Prigono
de
Albert
Lienhardt

facile viv-teni kaj vigligi la intereson de la lernantoj. Tiam, la lernado de la lingvo fariĝus pli plezuriga kaj malpli peniga, pli alloga kaj malpli enuiga, pli efika kaj do malpli elreviga. Plu, ju pli ampleksiĝos la kvanto de tiu-specaj legaĵoj "popularaj", laŭplaĉe elekteblaj, des pli fortiĝos la persistemo de la Esperanto-lernantoj.

Kriterioj de Esperanto laŭeble simpla

Sobra analizo de la problemo ebligas determini la kondiĉojn, laŭ kiuj didaktikaj legaĵoj devas esti verkitaj, por meriti la kvalifikon "maksimume simplaj kaj klaraj, do maksimume facil-kompreneblaj".

Tiuj kondiĉoj, klujn ni povus nomi "kriterioj de Esperanto laŭeble simpla", estas formuleblaj jenmaniere:

1) Uzi malkomplikitan lingvo-stilon, kun frazoj ne tro longaj, ĉar sen-fine longaj frazoj tede kaj for-timigas novulojn. (Vidu la modelan gvidilon por akiri bonan Esperanto-stilon: "Ne tiel, sed ĉi tiel", de F. FAULHABER.);

2) prefere uzi ordinarajn vortojn kaj dir-manierojn, kiajn oni bezonas en la ĉlu-taga vivo;

3) eviti neologismojn kaj ne-kutimajn fak-terminojn;

4) uzi participojn nur tiam, kiam ili estas nepre necesaj;

5) eviti pezajn vort-kunmetojn (kompleksajn vortojn), precipe kiam ties senco ne estas tuj klare ekkonebla;

6) uzi divid-strekon en du-radikaj kaj pli-ol-du-radikaj vort-kunmetoj, por fari ilin pli facile rekonleblaj, ekzemple: bel-aspekta, kulp-atesto, il-riparo, vaporŝip-asocio, k.s. (Vidu PLENA GRAMATIKO 1938, § 411);

7) eviti laŭeble la elizion de la finaĵo -o en vort-kunmetoj. Tiuj regulo pli-faciligas senteble la prononcon (ekzemple: fiŝo-sup, anst. fiŝsupo; mento-teo anst. mentteo; besto-ĝardeno anst. bestĝardeno, k.s.). Sam-tempe, tio ebligas ĝuste aŭdigi la ĉef- kaj flank-akcenton (ekzemple: suno-varmo kiel suna varmo, ne sunvarmo kiel ĝendarmo; aŭ: somer(o)-tago kiel somera tago, ne: somertago — nek somrtago! — kiel esparago; k.s. — Vidu PL. GRAM. § 4 kaj 51);

8) ĝuste uzi la divid-strekojn ĉe linio-fino (por transporti parton de vorto, pro loko-manko, en la sekvantan linion), dividante la vort-kunmetojn laŭ iliaj gramatikaj partoj, ekzemple: rid-inda (ne: ri-dinda), pasport-oficejo (ne: pasporto-ficejo), k.s. — Vidu PL. GRAM. § 4121);

9) uzi la akuzativon nur tie, kie ĝi estas nepre necesa, t.e. en rektaj komplementoj kaj por direkto-indikoj. Tio inkluzivas eviti ne-necesan anstataŭigon de certaj prepozicioj per akuzativo; estas preferinde (ĉar pli facile kompreneble) skribi kaj diri "memoru pri tiol" anst. "memoru tion!", aŭ "resti dum tri tagoj" anst. "resti tri tagojn", aŭ la dativon "kreditu al mi!" anst. la akuzativo "kreditu min!", k.s.

10) uzi malavare la interpunkciajn signojn, por montri, kie la leganto aŭ la parolanto iomete haltu, kaj faru mallongan "spiro-paŭzon". Abunda interpunkcio noteble faciligas al novuloj klare distingi la frazo-partojn (kaj, do, pli facile kompreni la sinsekvajn ideojn); same, ĝi pli-faciligas al aŭskultantoj kompreni la senco de parolataj frazoj. (Oni komparu, ekzemple, la du frazojn sam-vortajn, sed malsam-sencajn: "La knabo petis ĉokoladon, manĝante pecon da pano" kaj "La knabo petis, ĉokoladon manĝante, pecon da pano". — Vidu PL. GRAM. § 4031).



Agrabligi la lernadon

Kondiĉoj por praktika realigo

Por ŝtopi la gravan breĉon en la nun-tempa Esperanto-literaturo didaktika, kaj por ĉesigi la katastrofajn rezultojn de tiu breĉo, estas urĝe necese entrepreni adekvatajn realigojn.

Tiu-cele, estas dezirende:

— ke kapablaj aŭtoroj, kaj iliaj eldonistoj, interkonsentu pri verkado kaj publikigo de kolekto da novaj legolibroj, verkitaj en Esperanto laŭeble simpla kaj facile komprenebla. (Tio, kredeble, ne estas tre alloga tasko por talentaj verkistoj; fakte, neniu ŝatas subordigi sian propran lingvo-stilon al la disciplino, ĉi tie difinita. Sed la graveco de la atingenda rezultato devos instigi ilin for-oferi, por la prosperigo de nia movado, almenaŭ parton de siaj literaturaj ambicioj. Des pli, ke ja estas iom malrealisme verki tro alt-nivelajn beletraĵojn por la Esperanto-legantaro, kies granda pli-multo ne kapablas perfekte kompreni ilin.....);

— ke la Esperanto-recenzistoj adoptu cel-konforman star-punkton; ili ne ŝparu kritikojn pri literaturaĵoj tro komplikaj kaj tro malfacile kompreneblaj, da kiuj ekzistas jam multe tro multaj;

— ke la gazetistoj (redaktoroj de Eo-gazetoj; okazaj redaktantoj de artikoloj ĝeneralaj aŭ fakaj) klopodu uzi simplan kaj facile kompreneblan lingvo-stilon. (Oni ne forgesu, ke 85-90% de la Esperanto-publiko ne faris longe-daŭrajn lingvo-studojn; tiu publiko sen-dube preferas legi ordinaran, kutim-uzan, tre facilan prozon, ol cerbo-lacigajn plum-produktojn kun multe-pezaj vort-kunmetoj kaj sen-esperige komplikaj frazejoj!);

— ke la gvidantaj personoj en la diversaj Esperanto-organizaĵoj konsentu rekomendi al kapablaj junaj verkemuloj traduki taŭgajn prozo-pecojn en

Esperanton laŭeble simplan, por eventuala uzo en publikigitaj legolibroj. Specialaj konkursoj tiu-celaj certe donos bonajn rezultatojn;

— ke la plej bonaj prozaĵoj el elĉerpita legolibroj estu denove publikigitaj, post simpliga reverkado, parta aŭ tuta, konforme al la ĉi supre formulitaj kriterioj. (Tio, kompreneble, ne povas koncerni ne-tuŝeblajn tekstojn fundamentajn kaj klasikajn, a- kopl-rajte protektitajn.);

— ke estu restarigita la iama "Internacia Lingvo-Komitato" (I.L.K.) sub la aŭspicio de la Akademio de Esperanto. (Krome, en ĉiu lando, kie la movado estas sufiĉe forta, devus esti starigita sam-cela "Landa Lingvo-Komitato", L.L.K.). La taskoj estu: lingve kontroli ĉiujn iom gravajn manuskriptojn, konsili al la aŭtoroj eventuale dezirindajn stilo-simpligojn, kaj helpi kontroli la pres-provaĵojn.

Konkludo

Por akceli la dinamismon en nia movado, estas necese stimuli, per rimedoj praktikaj kaj efikaj, la intereson de ĉiuj Esperanto-lernantoj kaj -uzantoj.

Unu el la eblaj rimedoj estas la ĉi supre proponita: **faciligi kaj agrabligi la lernadon de la lingvo, helpe de taŭga literaturo didaktika.** Por esti plene kaj ĉiu-rilate taŭga, ĝi devas konsisti el modernaj, variaj, interesaj kaj vivantaj legaĵoj, precipe prozaĵoj, verkitaj en Esperanto komun-uzata, populara, laŭeble simpla kaj facile komprenebla.

Tiu urĝe bezonata literaturo didaktika povas esti kreata en estonteco relative proksima. Por tio, necesas kaj sufiĉas, ke ĉiuj kapablaj kaj celkonsciaj esperantistoj kunhelpu, ĉiu laŭ siaj eblecoj, plenumi la ĉi supre menciitajn kondiĉojn por praktika realigo.

Lingvo-spertaj legantoj, kiuj aprobas la principojn prezentitajn ĉi supre, kaj konsentas cel-serve kunlabori, laŭ konvena maniero, bonvolu skribi al la jena adreso: 24, avenue de Riedisheim, F-68 Mulhouse.



Kion skribis la gazetaro en 1968?

Günther Becker, estrarano pri informado

En miaj priinformaj artikoloj de la lastaj jaroj mi daŭre atentigis pri la graveco de la informado kaj dediĉis la spacon ĉefe al la statistika pririgardo de la rezultoj en la diversaj landoj, menciante bonajn agadojn kaj rekomendante ties imiton. Ne malofte vi legis pri la "Principaro de Frostavallen", kaj mi emfazis, ke kreskis la informado per modernaj rimedoj nome radio kaj televido. Temis tie ĉefe pri elsendoj en naciaj lingvoj pri Esperanto kaj la lingva problemo. En la lasta jaro aldoniĝis la pritrakto de la homaj rajtoj precipe de la lingva diskriminacio. Ne nur tiuj elsendoj havas grandan valoron por la informado pri Esperanto, sed ankaŭ la elsendoj en Esperanto mem. Ni ankoraŭ pli bone devus el informa vidpunkto eluzi la elsendojn, unue kompreneble zorgante ĉefe per daŭraj kontaktoj kun la redakcioj, ke ili restu kaj kresku. Bona informanto daŭre aŭskultas la radioelsendojn en Esperanto kaj skribas al la redakcioj ankaŭ siajn kontribuojn. Por ne ripeti ĉiam preskaŭ samajn eldirojn pri la ciferoj, kiuj ĉiukaze povas esti nur nekompletaj, mi ŝatus en ĉi tiu jaro prilumi iom parton de nia informado el alia vidpunkto, nome el la enhava.

Kion skribas la gazetoj en la diversaj landoj pri Esperanto kaj la lingva problemo?

Mi iom studis la problemon surbaze de la fakto, ke la Centra Oficejo daŭre ricevas artikolojn, kiujn ĝi post utiligo sendas al mi. Pri la jaro 1968 mi ricevis tiamaniere proksimume 350 artikolojn el 35 landoj en iom malpli da lingvoj. Temas nature pri hazarda elekto; krom tio pli ol 150 eroj venas el Nederlando, ĉar la Centra Oficejo troviĝas en Rotterdam.

El la tuta mondo

Ĉar ĉiukaze ne estas eble fari sciencan analizon, tio ne ludu gravan rolon. Ĉu temas pri "Genocido cultural y derechos del hombre", resumo kaj traduko de la artikolo de prof. Lapenna unue aperinta en ĉi tiu gazeto kaj kiu sub tiu nomo aperis en hispana gazeto, pri "Rechten van Mens neemt klacht FNP in behandeling" artikolo pri lingva diskriminacio en Nederlando kontraŭ la frisa lingvo (cetere kun mencio de la nova revuo "La Monda Lingvo-Problemo", kiu devus esti en la manoj de ĉiuj bonaj informantoj) aŭ aliaj artikoloj pri la homaj rajtoj kaj Esperanto, ĉu temas pri artikoloj kiel "Let us speak Esperanto" en angla lingvo kun ĉinlingva resumo en gazeto de Tajvano, diskuto pri Esperanto en tanzania gazeto post radioelsendo pri la temo aŭ rekomendo de la Internacia Lingvo en junulara gazeto de Cejlono aŭ pri "Un cercle d'études espérantistes sera prochainement ouvert à Dakar", — ĉie en la mondo oni legas pri Esperanto.

Sendube la kongresaj landoj liveras ĉiam vastajn informojn. Tiel ekzemple la granda ilustrita artikolaro en la madrida "SP rama", "El Esperanto: hacia el idioma universal", informas tre trafe kaj nepre objektivite pri niaj strebadoj.

La plej multaj artikoloj pri Esperanto venas el taggazetoj, sed estas ankaŭ aliaj specoj. Lerneja gazetoj parolas pri spertoj rilate la instruadon de Esperanto. Elstaras tiurilate la artikolo "Teaching the Universal Language" en Journal of the California Teachers Association. Ankaŭ gazetoj de lernantoj povas tre utile informi: kvankam ili ne havas vastan distribuon, ili estas atente legataj. Venas la vicoj de la Esperanto-kursoj: kiel ekzemplon mi menciis kurson en kostarika gazeto kaj kurson en gazeto de eŭropa partio, kiu rekomendas Esperanton en siaj statutoj. Esperanto-angulojn mi trovis en finna gazeto kaj jugoslava gazeto. Pola gazeto publikigas daŭre en literatura parto tradukojn de noveloj ktp. el Esperanto; tion mi jam trovis ofte en gazeto de Malto, nun ankaŭ en nederlanda, same mi ricevis ekzemplon el Japanujo. Gazeto eldonata en pluraj lingvoj daŭre publikigas artikolojn pri la uzo de Esperanto fare de sonbendistoj kaj multajn senpagajn anoncojn. Oni parolas pri radiamatoroj, kiuj utiligas Esperanton, kaj ankaŭ en filatelistaj gazetoj ne mankas artikoloj.

Malmultaj malfavoras

Kompreneble aperas relative malmulte da artikoloj kun malfavora mencio de Esperanto. Guste tiuj artikoloj donas bonan okazon por refuti la argumentojn prezentitajn kaj favore influi la legantojn. Plua instruiĝo de niaj kunlaborantoj, kiel trafe respondi, estas ankoraŭ multe bezonata. Precipe al gravaj artikoloj oni devas tre zorge respondi, eble kunordigite, sed nepre ne tiel, ke la afero aspektas organizita. Se oni nun demandas min pri artikoloj pri la lingva problemo kun prijuĝo de Esperanto, sed prezentantaj alian solvon, mi menciis la artikolon "Do you speak European?" el la angla gazeto "The Observer", kiu ja ne malfavore mencias Esperanton, sed ĉe la fino konkludas, ke versajne la angla fariĝos "la latino de Eŭropo", aŭ alia artikolo en New York Post, kiu rakontas al ni, ke prof. Sol Tax de la Universitato de Ĉikago ja konvinkiĝis, ke neniuj lingvoj de gvida lando ricevu la preferon, sed la armena lingvo, kvankam li unue preferis la malajan. Cetere liaj argumentoj por la armena lingvo estas interesaj. Ie mi ankaŭ legis pri preferindeco de la nederlanda lingvo por solvi la eŭropan lingvoproblemon.

Sendu eltondaĵojn!

Vi vidas, ke ne ĉiuj, kiuj ne preferas neŭtralan solvon, kantas odojn al la grandaj lingvoj. Almenaŭ iliaj argumentoj estas parte ankaŭ la niaj.

Pro la limigita spaco ne estis eble iri pli profunden en la aferon kaj doni pli da interesaj ekzemploj kun konsiloj kiel agi. Mi tamen ŝatus iam fari tion kaj havas peton al ĉiuj legantoj. Sendu ankoraŭ pli multe da artikoloj al la C.O., por ke ni povu fari pli detalan analizon. Tiu abunda sendado eble ankaŭ multe plifaciligos la taskon kompli la statistikon en la venonta jaro.

El ĉiuj siaj instruistoj, edukistoj kaj gvidantoj en "Ĥeder", la unuagrada hebrea lernejo, la knabo Eliezer, en postaj jaroj Ludoviko Lazaro Zamenhof, amis pleje sian longbarban, sveltan, modestan instruiston Josef, sekan laŭ aspekto, kun neforta voĉo, delikataj manoj kaj iom kurba dorso. Li havis revemajn okulojn, kaj lia lango — plej dolĉa mielo. Li sciis rakonti, kiel tion ne kapablis instruistoj kaj edukistoj en ne-hebreaj lernejoj, en kiujn la knabo transiris, kiam li estis dekjara.

La ekscitaj rakontoj de instruisto Josef fontis plejparte el la Biblia periodo. Liaj plej amataj herooj estis personoj de la Biblio. La mondo de la Biblio estis en liaj okuloj mondo reala.

La unuaj kvar jaroj en "Ĥeder" ĉe tiu instruisto en Bjalistok estis eble la plej feliĉaj en la infana kaj junula aĝo de Eliezer Zamenhof. Siajn sciojn li ĉerpis en la rusa real-lernejo, kiu estis en lia naskiĝurbo Bjalistok, sed edukon kaj inspiron spiritan li ricevis de la longbarba Josef, majstro de la ekscita rakonto kaj artisto de bela fabelo. Estis du specoj de fabeloj, al kiuj inklinis Josef kaj kiujn li uzis por sia ĝuo kaj por ĝuo de la etaj aŭskultantoj: rakontoj el la Biblio kaj rakontoj el la Bibliaj Komentarioj. Pli granda, ol estis lia amo al rakontoj de la Biblio, estis lia estimo al rakontoj de la Komentarioj. La unuajn konis preskaŭ ĉiuj, ĉiu infano spertis pri ili, ili estis komuna posedaĵo kaj la homoj ĝenerale konis ilin. Ne tiel estis koncerne la rakontojn de la Komentarioj. Tiuj ĉi estis lia privata posedaĵo, de lia "melamed dardaki" (infaninstruisto) Josef. Li sciis promeni tra ĝiaj bedoj, parfumi sin per ĝiaj floroj kaj transdoni la bonan parfumon al la amaso de siaj junaj aŭskultantoj..... Li prenis unu version el la libro Genezo kaj spicis ĝin per fasko da fabeloj kaj rakontoj pri samtemaj ĉiutagaĵoj. Foje ili alvenis al la konata verso de Genezo, parolanta pri la historio de Noa: "Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero." La longbarba delikatomova instruisto Josef ekiris en sian mondon de sorĉo, en mondon de fabeloj kaj rakontoj de la Komentario. Li komencis priskribi al siaj lernantoj, kiuj streĉis siajn orelojn kiel funelojn por kapti kaj ensorbi ĉiun vorton elirantan el lia buŝo, kaj li rakontis, kiel aspektis

LA KNABO ELIEZER

"La knabo Eliezer" estas eltiraĵo el hebrea verko "Famaj judoj" (eld. Samuel Simson, Tel Aviv, 1964), redaktita de S. Ŝkolski. Pri sia rakonto pri Zamenhof la aŭtoro, d-ro A. Porat, asertas, ke li jam ne memoras, el kiu fonto li ĉerpis la detalojn. Tre verŝajne multo devenas nur el lia fantazio. Tamen la rajtigitan tradukon ni volonte publikigas pro ĝiaj apartaj ĉarmo kaj freŝeco.

tiu antaŭa mondo, mondo de la Genezo, antaŭ ol la Eternulo intermiksas la lingvon de ĝiaj loĝantoj. "Kaj estis sur la tero unu lingvo" — ekkantis kaj muzikis la neforta kaj delikata voĉo de la infan-instruisto Josef: "Vi povis trapasi la tutan teron, ekiri al oriento kaj al okcidento, al nordo kaj al sudo kaj ĉie estis 'Komunaj vortoj' kiel diras la Genezo, unu lingvo, lingvo klara por ĉiuj, la malproksimoj estis forŝarĝitaj kaj vekis neniun timon, ĉar efektive ja tute ne estis dividoj inter via mondo, la proksima, la konata, kaj inter la 'malproksimoj', la strangaj, la nekonataj kaj la nekompreneblaj. Fakte en tiuj tagoj preskaŭ ne ekzistis fremdulo, ĉar vere ne estas fremdulo, se 'lingvo estas unu' tiam 'la vortoj estas komunaj'. Estis harmonio en rilatoj de homo al sia kunulo, eĉ se ili venis el diversaj regionoj kaj el diversaj kli-



Ilustro Agnes Lukács

matoj, ĉar la lingvo unuigis ilin. 'Unu lingvo' estas ĉiam ankaŭ 'klara lingvo', klarigis la instruisto Josef al siaj aŭskultantoj. Nebulo, malklareco, malamo, envio komenciĝas samtempe kun intermiksado de la lingvoj: La plej granda malbeno, kiu pezas sur la homaro, estas la fatalo de intermiksado de la lingvoj. Ne vane diris la anĝeloj: "Ni malleviĝu do kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia." (Genezo XI, 7). Ĉar intermiksado de la lingvoj estas fonto de malamo kaj envio, kiuj forigas la homon el la mondo. Kontraŭe — unu lingvo "lingvo klara" estas fonto de inspiro kaj de konstruo. Ne estas vana tiu ĉi argumento: "Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari. (Genezo XI, 6).

Eliezer estis laŭ sia naturo knabo de mola animo, revema kaj profundiĝinta en mondon de fantazio: Li daŭrigas la fadenon, kiun ŝpinis "ĝuste nun" instruisto Josef antaŭ siaj lernantoj: Li fermis siajn okulojn kaj vidis antaŭ si la mondon en la tagoj de ĝia juneco en tempo, kiam sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero.

Unu demando maltrankviligis la cerbon de la junulo: Kiel redoni la junecon al tiu displitita kaj konfuzita mondo, en kiu ni vivas?

Lia patro Mordeĥaj Markus Zamenhof estis homo de praktika vivo; la "Ĥeder", kiun vizitis Eliezer, ne kontentigis lin; Markus Zamenhof, devenanta el urbeto proksima al Bjalistok, translokiĝis al Bjalistok en la jaro 1857. Li estis tipa litova klerulo, lingvoscia, kaj li malfermis ĉi tie en Bjalistok modernan instituton por instruado de lingvoj, unuavice de la germana kaj franca. Li kutimis nomi sian filon Eliezer, kiu naskiĝis al li en la jaro 1859, ankaŭ "Ludvig". Jena estis kutimo de la kleruloj en tiuj tagoj: Hebrea nomo en la preĝejo kaj nomo fremdlingva en la strato. Li prenis sian filon Eliezer el "Ĥeder" kaj enirigis lin en t.n. reallernejon, kiu estis en Bjalistok. Eliezer farigis Ludvig: lernanto de "Ĥeder" — studanto de real-gimnazio. Eliezer estis la plej aĝa filo de Mordeĥaj Markus Zamenhof. Post li naskiĝis filino, kiu mortis en sia infaneco en sia deka jaro. Post ŝi naskiĝis ankoraŭ du filinoj kaj tri filoj: la familio grandiĝis. La enspezoj de la lingvoinstruisto ne grandiĝis. Lia malriĉa salajro sufiĉis apenaŭ por vivteni la familion. En la jaro 1873, kiam Eliezer atingis sian dekkvaran jaron, translokiĝis liaj gepatroj al Varsovio, ĉefurbo de Polujo. Mordeĥaj Markus Zamenhof ricevis tie la oficon de inspektoro de privata lernejo. Li fiksis sian loĝejon en juda kvartalo, en la strato Novolipia. Tie pasis la jaroj de juneco kaj maturiĝo de Eliezer. Li eniris en la jaro 1874 en la kvaran klason de filologia gimnazio en Varsovio. Li distingiĝis en studado, precipe en natursciencoj kaj en klasikaj lingvoj. En la jaro 1878, jaro en kiu li finis la gimnazian studon, li revenas al sia unua revo: Li festas en sia ĉambro en la strato Novolipia 12 la naskiĝtagon de "Universala lingvo", li kreas la unuan krudan formon de la lingvo Esperanto.

Rakonto: A. Porat

Traduko: O. Ginz

LAMPIROJ

Belartaj Konkursoj 1968: Originala Poezio Unua Premio

Jen ekbril', flava bril'
de lampiro.
Brilas sfer', eta er'
en rondiro.
Flavas lum'... Palpebrum'
ĝin estingas.
Tuj rebril' per flugil'
ree ŝvingas
ĉe lumdanc', en distanc'
tutproksima.
En kampar' — spikomar'
ja senlima —
dancas nun sub la lun'
mil lampiroj
el ĉiel', de la stel'
kavaliroj.
Dum dancad', la flirtad'

kun la spikoj —
silksusur', etmurmur'
de amikoj —
ekas jen per refren'
de grilkantoj:
Pulsas kor' en la hor'
de l' amantoj.
Ĉirpas gril', vibras mil
etaj liroj.
Vibras kord' kun agord',
dum lampiroj
pli kaj pli sub radi'
de lun' luma
dancas jen laŭ refren'
aminduma.
La velur' de lazur'
firmamenta —



Nicolino
© Rossi

Unufoje premiita
— sed tuj per
Unua Premio:
jen la salto,
kiun faris
la 30-jara Nicolino
Rossi. Naskita
en kampara familio
en la eta ŝtato
Sanmarino, li
estas nun hotel-
sekretario en
Italujo. Li
lernis Esperanton
en 1962.

glimbrilad', stelparad'
eminenta —
samas al nokta val'
lampirplena,
al traplekt' de insekt'
lumotena.
Melodi' estas ĝi
plej arkana
de l' natur', kvazaŭ spur'
diafana,
kiun kor' en dolor'
sekvas rave
kaj sen sent' de turment'
batas brave.
Korfeliĉ' — vivoriĉ'
ja fantoma,
efemer' sen esper'

de tuthoma
nia ras' en kiras'
enfermita
de l' sufer', de l' mizer' —
samkvalita
al ekbril' de lumil'
de lampiro,
daŭras, vel certe ne
pli ol spiro
de insekt' en aspekt'
lumodona.
Sed eĉ er' de esper'
anim-sprona,
por la kor' en dolor'
pli valoras
ol la riĉ' de feliĉ'
kiu foras.

Iam je meznokto prema, kiam lace meditema
mi raviĝis super libroj forpasintaj el memor',
dormskuiĝis mia kapo. Jen subite sur pordklapo
ekaŭdiĝis ies frapo, frapo milda sen sonor'.
"Vizitanto nur," mi grumbliis, "pordon frapas sen sonor',
alveninto el la for'."

Oj, la rememor' lucida — Estis en decembro frida;
de l'mortantaj braĝoj spektroj iĝis planka artlabor'.
Mi sopiris je l'mateno, serĉi libre vanis peno
por finiĝo de l'ĉagreno pro la perdo de Lenor',
la radia rara damo en ĉiel' kun nom' Lenor'
— ĉi la nom' por ĉiam for.

La silkeca kaj susura svago de l'kurten' purpura
min agitis — min ekscitis fremda sento de horor',
ke al kor' en malkvieto mi parolis per ripeto:
"Estas vizitant' kun peto pri akcepto en ĉi hor';
sole vizitant' kun peto pri akcept' en tarda hor',
alveninto el la for'."

Nun fortiĝis la spirito kaj mi diris sen hezito:
"Mi pardonon petas vere, Sinjorino aŭ Sinjor';
dormskuiĝis mia kapo, surdis sur la pordoklapo
tiel milde via frapo, frapo preskaŭ sen fervor',
ke apenaŭ mi vin aŭdis," — mi malfermis kun fervor' —
Nur mallumo ĝis la for'.

Tra l'mallum' mi longe gapis, miro, timo min ekfrapis,
mi dubeme revis revojn ĝis nun en nenies kor'.
La silent' perfekta estis kaj kviet' sensigna restis;
solan vorton mi atestis, estis la susur' "Lenor'?"
Tiun flustris mi kaj eĥo vorton flustris re "Lenor'!"
Tiun nur kaj eĥis for.

Al la ĉambro mi revenis dum l'anim' je fajro plenis;
kaj aŭdiĝis baldaŭ nova, nun pli laŭta frapsonor'.
"Jen," mi diris, "estas io apud mia ĵaluzio;
mi atingu do al scio de l'mistero per esplor'.
— Kor' silentu dum mi solvos la misteron per esplor'.
Nur la vento en la for'."

Vastmalfermis mi alstrate, paŝis flirte, flugilbate
enen nobla Korv' el tempoj jam pasintaj el memor'.
Ĝi sen riverenc' envene, nul minuton sindetene,
sed lordin — aŭ lordmiene saltis al la porddekor'
— Grimpis sur la Pallasbuston super mia porddekor' —
Sidiĝonte grimpis for.

Malgraŭ ke mi tiel tristis, min l'ebona birdo distris
pro l'konduoto grava, plena de severo kaj honor'.
"Kvankam kalva krest' vin kronas," diris mi, "vi ne poltronas;
kiun lordan nomon donas, korv' el plaĝo de l'Horor',
al vi, praa hida Korvo, Pluta plaĝo de l'Horor'?"
Ĝi regrakis: "Ne plu for."


Kion tiel klare diris la plumpulo, mi primiris;
tamen la respond' sen multa senco — estis sen valor'.
Sed mi diras kun decido, ke ankoraŭ al homido
ne prosperis tia vido — birdo super porddekor' —
— Bird' aŭ besto sur skulptita busto super porddekor',
kun la nomo "Ne plu for."

Sed sur paca bust' izole sidis Korv' kaj diris sole
tiun vorton kvazaŭ estus ĝi elverŝ' el tuta kor'.
Ĝi sin plu ne manifestas, de la plumoj mov' forestas,

LA KORVO

Edgar Allan Poe

Traduko de
Leopoldo H. Knoedt



Ilustro de Gustave Doré

Tiu ĉi traduko de la "preskaŭ netra-
dukebla" poemo de Poe gajnis por
Leopoldo Knoedt la Unuan Premion en
la branĉo Traduka Poezio de la Be-
lartaj Konkursoj de UEA, 1968.

Edgar Allan Poe — usona poeto,
eseisto, novelisto, kreinto de la moder-
na detektiv-rakonto — mortis, ankoraŭ
ne 40-jara, en 1849, unu el la grandaj
figuroj de la monda literaturo. Kiel poe-
to, pere de la tradukoj fare de Baudelaire,
li forte influis la postan simbolis-
man skolon. Lia poezio estas tute sub-
jektiva kaj morna, kiel estis ankaŭ lia
vivo de adoptita orfo, de mizerulo dro-
ninta en ŝuldoj kaj serĉanta eskapon en
ebrio.

La poemo estas rememoro pri virina
amo (lia dumviva obsedo) fruo konita
sed frue perdita. Ĝi estas sonora kaj
sentimentala, laŭ la tiama stilo, kaj
plenaj de ripetoj kaj refrenoj, karak-
terizaj ĉe Poe.

Leopoldo Knoedt diskoniĝis per sia
traduko de "Elektitaj Poemoj" de Castro
Alves, kiun eldonis la Universitato de
Bahia. Amazonaj fabeloj, verse rakon-
titaj, atendas eldonon ĉe Stafeto. Pretas
"La Luzidoj" (Luiz de Camões, 16a j.c.),
portugala epopeo, apartenanta al la
mondliteraturo.

ĝis mi flustris: "Kiel restas de l'esperoj nur memor',
kaj de l'amikaro, ĝi matene estos nur memor'."
Ĝi regrakis: "Ne plu for."

Skuis min silent' rompita de respondo tiel sprita;
"Certe," diris mi, "Ĝi estas ĝis sola vorttrezor',
de mizera mastro vorto, kiun malfeliĉa sorto
sekvis kun kreskanta forto, ĝis en kantoj pezis kor',
ĝis en himnoj de espero pezis morne sur la kor'
tiu "Ne plu-ne plu for."

Kvankam mi tiele tristis, min la Korvo tamen distris;
mi alrulis seĝon al la birdo, bust' kaj porddekor';
post dronado enfotela, mi revadis kiocela
de l'aŭgura birdo el la temp' pasinta el memor'
— Hida, plumpa, fata bird' el temp' pasinta el memor', —
estis grako "Ne plu for."

Tion mi diveni provis, sed eĉ ne silabon blovis
al la bird' gvatante fajre, rekte nun al mia kor'.
Ĉi kaj pli mi divenemis, dum la kapon mi alpremis
al kusen' sur kiu tremis lumo sur violkolor',
kies lampe lumigatan kovron de violkolor'
kaŝos ŝi, alĥi, ne plu for.

Ŝajne nun l'aer' pli densis, il' kaŝita ĝin incensis,
de l'serafoj ĝin ŝvinganta planke tintis paŝsonor'.
"Dank'al cia Di'," mi diras, "per anĝeloj vi akiras
la nepenthon kiu ŝiras el vi pensojn pri Lenor';
drinku, drinku la nepenthon: pens' foriĝos de Lenor'.
Grakis Korvo: "Ne plu for."

'Ĉu profet' aŭ de l'malbono il', birdo aŭ demono!
Ĉu vin sendis la Satano aŭ vin ĵetis ŝtormrigor'
al ĉi morna tamen spita lando sorĉa kaj ermita,
diru ĉu en ĉi hantita hejmo plena de horor',
ĉu de Galeed balzamo fino estos de l'horor'?"
Ĝi regrakis: "Ne plu for."

"Ĉu profet' aŭ de l'malbono il', ĉu birdo aŭ demono!
Pro la ĉielvolbo kaj pro l'Di' de nia kunador',
ĉu foriĝos la ĉagreno de l'animo en Edeno,
diru, post brakuma teno de la dam' kun nom' Lenor',
de l'radia, rara damo en ĉiel' kun nom' Lenor'?"
Ĝi regrakis: "Ne plu for."

"Nin ĉi vort' disasocias, birdo aŭ demon'," mi krias,
"Iru re al ŝtormo kaj al Pluta plaĝo de l'Horor'!
Nigra plumo ne postrestu, ĝi mensogon ne atestu!
Mian solon ne molestu! For de mia porddekor'!
Bekon for el mia koro! For vi mem de l'porddekor'!"
Grakis Korvo: "Ne plu for."

Kaj la Korv' ne malrigidas, ĝi plu sidas, plue sidas,
sur la pala Pallasbusto super mia porddekor';
ŝajnon la rigard' ricevas de demono kiu revas;
sur la plank' ĵetite ŝvebas ĝia ombro sen kolor',
kaj animo mia el surplanka ombro sen kolor'
sin relevos ne plu for.

Glosoj:
Lucida == klara.
Svaga == mal'klara, necerta.
Nepentho == drogo senzorgiga.

RELIGIA NEŬTRALECO DE UEA

Skribas Erik Carlén (Svedujo):

En la maja numero de Revuo Esperanto oni trovas informon pri planita interreligia kunveno dum la 54-a Universala Kongreso sub la rubriko: "Realigōs deziro de Zamenhof?" La teksto sub la rubriko sciigas, ke "unu el la nerealigitaj ambicioj de d-ro Zamenhof estis okazigo de universala kongreso pri neŭtralehoma religio".

Mi tre bedaŭras, ke tiu ĉi teksto aperis kaj en tia loko. Tio donas al la leganto la impreson, ke la interreligia kunveno estas aranĝo kun speciala apogo de UEA. Facile tio povas kredigi al homoj, ke UEA laŭ la ideoj de Zamenhof laboras por enkonduki ian sinkretisman, home farotan aŭ faritan miksreligion. Tiel ne estas. UEA estas absolute religie neŭtrala (kiel ankaŭ politike), kaj

ĝi ne intencas labori por ia "verda" religio. Tial estas loko por ĉiaj religianoj en la Esperanta movado kaj en UEA, kondiĉe ke ili ne kontraŭlaboras la bazan ideon de Esperanto. Zamenhof nomis ĝin la "interna ideo" kaj difinis ĝin "frateco kaj justeco inter la popoloj". Ĝi estas nenio alia, ol la deklaro pri la Homaj Rajtoj esprimas. Do la baza ideo de Esperanto ne estas religio sed plej alta kulturo aŭ homeca alta ideo.

Persone mi min detenas de interreligia kunveno kaj la intencoj fari sinkretisman home-neŭtralan religion. Mi faras tion, ĉar mi estas kristano, kaj mi scias, ke la plimulto de la svedaj KELLanoj samopinias kun mi. En homecaj kaj kulturaj medioj mi kompreneble povas kunlabori kun ĉiuj homoj, senkonsidere kian religion ili havas: Kaj tion mi lojale volas fari en la Esperanto-movado.

Biblioteka centrigo

Skribas Probal Daşgupto (Kolkata):

La Esperanta literaturo iĝas ĉiam pli riĉa, kio faras la taskon alfrontendan far kaj vortaristoj kaj bibliografiistoj kaj literaturstudentoj aŭ -historiistoj terure malfacila. Nek la famaj roterdama kaj viena librotekoj nek la londona bibliotekego havas ĉiujn librojn eldonitajn en Esperanto.

Por plisimpligi la taskon de la leksikologoj k.c. oni devas krei centron, kiu ricevos ĉion ajn presitan aŭ multobligitan en la lingvo. Nia lando leĝe devigas, ke oni ĉiun libron post eldono sendu al tri grand-librotekoj: kial ne neskribita leĝo faru la samon por Esperanto? Ĉu oni estas pretaj konfidi la taskon al UEA kaj helpi UEA plenumi ĝin? Ĉu UEA pretas preni ĝin sur sin?

Respondas la redaktoro:

Oni povus diri, ke jam ekzistas ia neskribita leĝo, ke ĉiujn novajn eldonaĵojn oni sendas al la tri plej grandaj bibliotekoj: Internacia Esperanto-Muzeo Wien, Biblioteko Hodler ĉe UEA kaj la Biblioteko de BEA en Londono. El ili, IEMW ĝuas la avantaĝon, ke pagas ĝian konservadon la aŭstra ŝtato. Ĝi estas, do, finance pli sekura, ol tiuj de Esperanto-asocioj. Pro tio oni povus diri, ke ĝi havas la plej fortan rajton ricevi senpage ĉiujn novajn eldonaĵojn. Sed ĉiuj tri efektive devus havi tiun rajton. Se temas pri la Biblioteko Hodler en Rotterdam, ĝia kolekto estas maksimume kompleta por la postmilita periodo, dum por la fruaj jardekoj restas kelkaj gravaj mankoj.

Estas afero bedaŭrinda, ke ĉiuj tri plej grandaj Esperanto-bibliotekoj troviĝas en Eŭropo, kaj oni devus pripensi estontece la pligravigon de ekster-eŭropaj bibliotekoj, ekzemple tiuj en Buenos Aires, Tokio, Ottawa kaj Montevideo.

Studenta agitado



Proponas Emile Gillet (Belgujo):

Konsiderante la fortan diskutblovon, kiu ekskuis la junularmondon, mi venis al la ideo, ke nia movado povus trovi profiton en tiu diskutvento. Esenca postulo de tiu junularo konsistas en la reformo de la instruado je ĉiuj niveloj. Nuntempe, krom la gepatra lingvo, la junuloj estas devigataj lerni unu, du... eĉ tri fremdajn lingvojn. Okaze de la venonta Kongreso de UEA, ĉu ne estus eble organizi kunvenon kun la celo naski en ĉiuj landoj samtempe agitado en medioj de lernantoj pri la problemo de lingvo internacia?

Respondas la redaktoro:

Ĝuste en Helsinki la Unua Ĝenerala Kunveno de UEA estos dediĉita al la temo "La lingva problemo en la kadro de la monda politiko kaj la taskoj kaj ideo bazo de la Esperanto-organizaĵoj". Jen la la okazo por diskutigo de tia propono.



POR LA JUNULARO

Ilustraĵo el
"Du Rakontoj"

Recenzas Vilmos Benczik (Budapest):

Du noveloj, de Arkadij Gajdar. El la rusa tr. V. Samodaj kaj E. Ostroĵnikova. Moskvo: Komisiono de sovetaĵ esperantistoj, 1968. 94 p. Ilus. Ofset. 21 cm.

Tiu ĉi nova eldonaĵo de la sovetaĵ esperantistoj entenas du rakontojn de la populara soveta porjunulara verkisto A. Gajdar (1904-1941). La unua, "R.M.K." (la misteraj literoj signifas: "Revolucia Milita Konsilio") estas historieto el la tempo de la interna milito post 1917: ĝi rakontas, kiel du simpatiaj knabetoj savis la vivon de ruĝarmeano, restinta en vilaĝo okupita de la malamiko.

"Ĉuk kaj Gek" estas ĉarma historio same pri du knabetoj, kies petolemo ĉiam kaŭzas zorgon al la patrino — ĉifoje eĉ neĉiutagan.

Ambaŭ pecoj estas tre bone verkitaj, klasiĝas kiel bona porinfana/porjunulara literaturo. La tradukintoj ne malhavas certan lingvan inventemon; kelkaj rusismoj tamen englitis.

Mendu ĉe UEA: 1,80 gld. + sendokostoj 10 %.

manipulado de lingvaj iloj kaj reguloj. Ili taŭgas por meminstruo same kiel por kursoj. La vortlistoj entute okupas 32 p., la legaĵoj 120 p., kaj la ekzercoj 55 p. La lingva nivelo estas bonega, la literatura nivelo varias: kelkaj eroj estas krudaj burleskaĵoj, aliaj profundemociaj dramoj kaj spritaj satiroj.

Listo de rekomendindaj libroj, adresaro de landaj Esperanto-asocioj kaj de landaj junularorganizaĵoj finas la libron. Bedaŭrinde preseraroj ne forestas. Valora libro, precipe pro la riĉeco je tre variaj ekzercoj.

Mendu ĉe UEA: 7,20 gld. + sendokostoj 10 %.

Klasika vortfarado

Recenzas D. B. Gregor (Britujo):

Fundamentaj reguloj de la vort-teorio en Esperanto; Raporto al la Akademio Esperantista verkita de d-ro René de Saussure, prezidanto de la komisiono pri vortfarado. Foto-represo de la eldono Bern 1915. Saarbrücken: Iltis, 1969. 40 p. Ofset. 15 cm.

Jen la Sarlandanoj regalias nin denove per unu el la klasikaj verkoj de la esperantologio, ĉi-foje rilatanta la vortfaradon. Fontante el verko de Couturat de 1907, tuta serio da kontribuaj eldonaĵoj, plejparte el la plumo de René de Saussure, famekonata ankaŭ ekster Esperantujo. (Bona trarigardo fare de M.C. Butler en "British Esperantist" de Juli-Aŭg. 1953 ĝis Maj-Jun. 1954). Ĉi tie en 1915 S. resumis siajn studojn por "submeti ilin al la aprobo de la Akademio", kiu du jarojn antaŭe estis akceptinta nur du el la proponataj principoj, ĉar multaj membroj ne agnoskis la gramatikan karakteron de la radikoj. Sed ĝuste de tiu karaktero dependas la plej fama el la Saussure'aj principoj (tiu de neceso kaj sufiĉo), kiel atentigas Kalocsay en Encikl. 2, 564. Hodiaŭ ni ĉiuj lernis pensi laŭ la teorio de S., eĉ se ni obstinas uzi la de li kondamnitajn 'orumi' kaj 'butonumi'.

Mendu ĉe UEA: 3,60 gld. + sendokostoj 10 %.

PROGRESIGAJ PAŜOJ

Recenzas G. F. Makkink (Nederlando):

Paŝoj al plena posedo; Progresiga legolibro de Esperanto kun lingvaj ekzercoj, de William Auld. Bruselo: Heroldo de Esperanto, 1968. 237 p. 20 cm.

Kontraste al la instruado de naciaj lingvoj, kiu informas la lernanton pri la etoso de la koncernaj popoloj, Esperanto povas kaj devas doni ion novan: ĝi instruu la etoson de supernacia hom- kaj mondkoncepto. Niaj lerno- kaj legolibroj nepre plenumu tiun postulon. La legolibro de Auld enhavas 30 legaĵojn (rakontoj, anekdotoj, noveloj, traktaĵoj, biografioj, fragmentoj el poemoj dramoj kaj satiro, ktp.), sed nur tri el tiuj rekte koncernas la Esperantan ideologion, kaj unu tuŝas la frenezecon de la milito. Mi bedaŭras tiun tro modestan prezenton de nia etoso. La ceteraj eroj tamen montras per siaj devenoj la vastecon de nia mondo.

La libro enhavas 30 ĉapitrojn, senescepte konsistantajn el vortlisto, legaĵo kaj ekzercoj. La lernanto do ne bezonas perdi tempon, serĉante vortojn en vortaro; li kontraŭe povas uzi multan tempon, farante la tre variajn ekzercojn kaj taskojn. Tiuj devigas al konscia legado kaj relegado, al

Donald E. Parrish

NEKROLOGO

DONALD EVANS PARRISH (1889-1969)

Mortis subite en Los Angeles s-ro D. E. Parrish, ĉef-delegito kaj kotiz-peranto de UEA dum multaj jaroj ekde 1929. Li estis 79-jara. Lerninte Esperanton en 1907, li vaste uzis ĝin en Eŭropo, Azio kaj Afriko dum ofica prelegvojaĝo en 1911-12. En 1915 li kunorganizis la Universalan Kongreson en San Francisco. Lia vidvino, s-ino Poula E. Parrish, estas dan-devena, kaj la familio Parrish estis unu el la plej fruaj, kiuj uzis Esperanton kiel hejman lingvon. Ambaŭ geedzoj bone konis la familion Zamenhof. La pasintjara kongreso de ELNA en Covina omaĝis al s-ro Parrish pro lia pli ol 60-jara aktiva laboro en la Esperantomovado. (Nova ĉef-delegito por Usono estas anoncota.)

Laste aperis . . .

La nova lernolibro por finnoj



Monumente elstaras el la ĉi-monata fasko da nov-aperajoj la impona dulingva eldono de "La Nobla Korano" en la Serio Oriento-Okcidento. Sendepende de ĝia valoro en la Esperanta literaturo, ĝi signifas gravegan paŝon por la lingvo en ĉiuj arabaj kaj aliaj islamaj landoj. Gustatempe por nova antaŭenpuŝo de Esperanto en tiuj landoj pretiĝis ankaŭ nova lernolibro por araboj: "Esperanto-araba lernolibro" de Nassif Isaac, kiu postsekvas la samaŭtoran vortaron. La 71-paĝa lernolibro kostas 3,15 gld.

Lerniloj kaj informiloj

Same gravaj en siaj sferoj estas du aliaj novaj lernolibroj: "ĵamborea lingvo" de Hammer (vidu p. 114) kaj "Via dua lingvo" de Veli Kolari — la moderna kurso akompana al la ĉi-jara radiokurso en Finnlando. En Japanujo sendube havos gravan efikon la japanlingvaj vojaĝimpresoj de s-ino Namiko Isiguro, eldonitaj de konata firmo sub la titolo "Mondo de Esperanto". Informan valoron havas ankaŭ la inaŭgura prelego de f-ino A. J. Middelkoop, kiu antaŭ nelonge anstataŭis la forpasintan mag. Pragano kiel instruanto de Esperanto en la Universitato de Amsterdam. La 23-paĝa broŝuro portas la titolon "Humoristische trekken in de Esperanto-literatuur".

Kreskis lastatempe la uzo de Esperanto ĉe komercaj foiroj. Prospektojn denove eldonis ĉi-jare la Foiroj de Padova (Italujo) kaj Liberec (Ĉeĥoslovakujo). Novan turisman prospekton eldonis ankoraŭ unu finna urbo: Hämeenlinna, ekskurso-celo de la ĉi-jara UK.

Mendojn de novaj eldonaĵoj oni bv. adresi al la Libroservo de UEA, Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki prezon en guldenoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.

Kanibalismo reaperas en la Esperanto-movado

"Post komuna frat-manĝado ĉe la loka restoracio, oni organizos distrajn prezentadojn." (- El anonco pri Esperanto-renkontiĝo. Post tia orgio oni ankoraŭ pensas pri distraĵoj!)

LOKE – FAKE – PERSONE

LOKE

Aŭstrujo


• Trilanda (aŭstra-itala-jugoslava) renkontiĝo en Arnoldstein (5-6 apr.) allogis 125 partoprenantojn kaj decidis starigi komitaton por pritrakto de komunaj problemoj.

Francujo

• Cent personoj partoprenis dulandan renkontiĝon hispana-francan en Perpignan la 8an de junio. Festan paroladon faris d-ro A. Albault, prezidanto de UFE.

La mienoj perfidas, ke la franca-hispana renkontiĝo en Perpignan en junio ne estis ĉiam tute serioza afero...

Maldekstre: festparolanto André Albault atendas la parolvicon post René Llech-Walter.



William Auld aperis en literaturista intervjuo pri Esperanto en la skota televido fine de majo.

PERSONE

Auld

• Kiel "elstara Esperanta poeto" aperis William Auld en skota televido la 30an de majo. En viva intervjuo li respondis demandojn kaj deklamis propran originalaĵon.

Balkányi

• Jam 50 jarojn servas s-ro Paŭlo Balkányi, Budapeŝto, kiel delegito kaj fakdelegito de UEA. Plej varmajn dankon kaj gratulon pro la jubileo!

Collinder

• La 22an de julio festas sian 75-jaran datrevenon la monde konata lingvisto Björn Collinder, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

Lukáts

• Oficiale sendita de la hungara reformita sinodo, paroĥestro József Lukáts el Budapeŝto sukcese prelegvojaĝis 3 semajnojn tra Svedujo en majo laŭ invito de la sveda sekcio de KELI.

Jugoslavio

• Novan gazeton eldonas Esperanto-societo Ljubljana kiel ofsetitan organon de Esperantomovado en Slovenio. Formato: 21 cm. Titolo: "Esperanta Heroldo". Amplekso: 16 p. Plejparte nacilingva.

Kostariko

• Esperanto-kurson de Domenico Pastorello publikigas la kostarika gazeto "La Opinión".

FAKE

Biblifilio

• Reapers pra-projekto pri solvo de la lingva problemo: latina verko "Ars magna sciendi" de A. Kircher (Amsterdam, 1669). Represos ĝin firmo Georg Olms, D-32 Hildesheim, Am Dammtor, Germanujo. Prezo ĝis 31.12.69: 128,— g.m.; poste: 154,— g.m.

Filatelo

• Numeritaj, subskribitaj kaj speciale poststampitaj memorigaj kartoj pri la Unua Franca-Germana Esperanto-Kongreso (1969) estas mendeblaj ĉe la delegito de UEA en Oberkirch, Germanujo, po 10 steloj.

Kosmologio

• Ekaperis nova serio de la bele ofsetita kaj ilustrita revuo de la Martinus-Instituto en Danujo: "Kosmo". La unua numero de 1969 estas 24-paĝa, 25 cm. alta. Redaktas Per Bruus-Jensen. Abono (4 numeroj jare) kostas \$2,—, Odreso: Mariendalsvej 94-96, DK-2000 Kopenhago F.

Literaturo

• En 600-paĝa serbokroata "Antologio de tutmonda ampozio", aperinta en Zagreb antaŭ nelonge, aperis krom tradukoj el multaj naciaj lingvoj ankaŭ ampoemoj Esperantaj (Baghy, Hilda Dresen, L. Jevsejeva), tradukitaj de prof. Velebit.
• Post "Franjo Tu Haŭ", "Meze de l' flamoj" kaj "Senelirejo", nun ankaŭ kvara vietnama verko, "La lasta altaĵo", aperis en la japana tradukite per la ponto de la Esperanto-traduko. Japanigis Kurita kimiaki. Eldonis Tōhōsyūppansya.

Politiko

• ĵus eldonita nova katalogo de verkoj de Maŭ zedong en Esperanto montras, ke ĝis nun aperis 55 apartaj broŝuroj kun entute 2100 paĝoj (ne kalkulante reeldonojn).

Progresas la Enciklopedio

La redaktaj laboroj por dua eldono de **Enciklopedio de Esperanto**, unu jaron post lanĉo de la entrepreno, bone evoluas. Por kunlaboro sin disponigis fakuloj pri movado, lingvo kaj literaturo en multaj partoj de la mondo. Naciaj komitatoj, kiuj en sia respektiva lando okupiĝas pri historio de la movado, tradukoj el la nacia literaturo kaj biografioj de pioniroj, establigis ĝis nun en Bulgarujo, Hungarujo, Italujo, Japanujo kaj Pollando. Nur malmultaj Landaj Asocioj ankoraŭ ne reagis je la invito pri kunlaboro; el la Fakaj Asocioj iom pli multaj ne respondis la alvokon.

Daŭre plilarĝigata estas la reto de kunlaborantoj pri lingvistikaj artikoloj. Fidindaj helpantoj estas serĉataj por trastudi jarkolektojn de Esperantaj revuoj. Por faciligi la orientiĝon pri la enhavo, la redakcio eldonis provizoran indekson de la antaŭviditaj artikoloj. Manuskriptoj nun regule alvenas; ĉefe atento koncentriĝas al parto A-C, kiu verŝajne estos prespreta en 1970.

Flanke, la redaktoroj i.a. instigis fotorepreson de la Bibliografio de Stojan, kunlaboras en la dua eldono de "La Internacia Lingvo. Faktoj pri Esperanto", iniciatis katalogon de interlingvistika literaturo en okcidentgermanaj bibliotekoj kaj subtenas specialajn studojn, ekz. pri historio de IKUE.

Por garantii glatan progreson de la redaktado, estis starigita **Fondaĵo Enciklopedio**. Al la ĝisnunaj kontribuintoj ni tre kore dankas, samtempe petante la publikon pri plia subteno.

R. Hauptenthal
U. Lins

LA JUNA VIVO



**Oficiala organo de TUTMONDA
ESPERANTISTA JUNULARA
ORGANIZO.**

**Respondekas: Robert Lloancy,
LIV, rue de la Marinade,
F-66-Tresserre, Francujo.**

KIEN VOJAĜI ĈI-SOMERE?

Ĉiujare, la plej granda manifestacio de esperantistaj gejunuloj estas la INTERNACIA JUNULARA KONGRESO. En 1969, la jubilea 25-a IJK okazos en Tyresö (Svedujo) de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto, kelkajn tagojn do post la UK de Helsinki. Jam nun aperis la antaŭvidita programo. Krom la kutimaj aranĝoj pri ekskursoj, balo kun elekto de "Fraŭlino Esperanto", oratora konkurso, laboraj sesioj de la komitato de TEJO, estas ankaŭ planita tuta aro da paroladoj kun posta diskutado inter la aŭskultintoj ĉirkaŭ la ĝenerala temo "Junularo kaj socio".

En rilato kun tiu ĝenerala temo, la komisiito de la estraro de TEJO por la servo pri edukado de gvidantoj proponas jenan diskutkunvenon: "Landa sekcio de TEJO kaj la socio". Ĝia celo estas klarigi la rolon de la LS en internaciaj rilatoj de la junularo kaj reliefigi la specialajn kapablojn kiujn donas al la junularo, ĝenerale, la gvida pozicio en la Esperanta movado. Ĉar speciala aliĝo estas bezonata, ĉiuj interesiĝantoj sin turnu al la LKK por antaŭanonci sian partoprenon. Baza dokumento estos sendata al la antaŭaliĝantoj, aliaj partoprenantoj ricevos ĝin surloke. Ĝia prezo estas po 3,25 US dol. Skribu al Myggdalsvägen 123, S-135 00 Tyresö, Svedujo.

Ĝis la 10/04/69 aliĝis 41 personoj el Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Finnlando, Francujo, Hungarujo, Japanujo, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Sovet-Unio, Svedujo, Usono.

KONGRESO DE STELO

Graz, en Aŭstrujo, gastigos la 4-an kongreson de studentoj de la 15a ĝis la 22a de julio. Tiu frua periodo ebligas al partoprenantoj de la UK en Helsinki, sen troa laciĝo, tien vojaĝi.

La ĉeftemo de tiu kongreso estos: "Studentaj utopioj, Moviloj de monda progreso". Ĝi ebligas publikan universitatan diskuton. Pluraj konkursoj estas antaŭviditaj, kaj ankaŭ ekskursoj kaj vizitoj. La studenta Esperanto-klubo de Zagreb prezentos teatran vesperon.

Studentoj amase aliĝis al tiu elstara renkontiĝo, kiu konigos al vi pentrindan regionon, kaj vin bonvenigos en simpatian kaj amikan etoson. Vi eĉ povos post la UK partopreni la IJK en Tyresö. Agrablajn feriojn ni tutkore deziras al ĉiuj, kaj ankaŭ ĝojan esperantistan kunvivadon.

EL ĈEĤOSLOVAKUJO

Kun granda plezuro ni ricevis bonajn sciigojn por la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakujo. Kune kun Ĉeĥa Esperanto-Asocio estis fondita en Brno, la 30an de marto junulara sekcio. La proklamdeklaro akcentas, ke: "la komitato, strebos kune kun junaj esperantistoj en Slovakio krei Ĉeĥoslovakian Junularan Esperantistan Organizon, kaj petos aliĝon de la sekcio al TEJO".

Kuraĝigan saluton ni sendas al la tieaj esperantistaj gejunuloj.

KULTURA FESTIVALO DE POLA ESPERANTO-JUNULARO

En la por esperantistoj tre konata urbo Bialystok okazis, de la 11a ĝis la 14a de aprilo 1969, la unua kultura festivalo de polaj esperantistaj gejunuloj, kiu estis sukcesplena aranĝo. Partoprenis ĝin pli ol 80 nacioj kaj kelkaj eksterlandaj gastoj, el Bulgarujo, Francujo kaj Hungarujo.

Ankaŭ en Pollando, sed en Torun, okazis la 5a Internacia Esperanto-Seminario, en la universitato Nikolao Kopernik. Ĝi estis organizita de la studenta scienca rondo de tiu universitata urbo. Samtempe okazis konferenco pri instruado de Esperanto en altlernejoj. Ekskursoj, konkursoj kaj koncerto kontribuis al la riĉeco de enhavo de tiu seminario.

UNIVERSITATAJ KURSOJ EN ĈILIO, FILIPINOJ, NEDERLANDO;

El Latinameriko atingis nin plia agrabla novaĵo. Al modela agado de gejunuloj el Argentino, Meksiko, Brazilo kaj Kolombio, aldoniĝis laste ankaŭ gejunuloj el Ĉilio. En la universitato de Santiago ekfunkciis kurso de Esperanto por komencantoj. La kurson organizis tre vigla tiea grupo, sub gvido de Margarita Cruz. Ni devas ankaŭ menciigi, ke la Prezidanto de TEJO, d-ro Hans Michael Maltzen, nuntempe studvojaĝas en tiu lando.

El tute alia mondparto, nome el Filipinaj Insuloj, venis informo, ke 200 studentoj lernas Esperanton en la kolegio Zaragoza, en Tayug, Pangasinan.

La TEJO-sekcio de Nederlando informas, ke lekcioj de Esperanto rekomenciĝis en la universitato de Amsterdam, sub instruado de f-ino A. J. Middelkoop.

Kaŭkazaj Rakontoj

"Turnante la lastan paĝon oni pensas bedaŭre: 'Ha! Jam finita!', kio estas laŭ mi la plej bona — kaj por esperantlingva verko malofta — komplimento."

G. L. en SAT-Amikaro

Prezo: 5,— gld. + 10 % por sendkostoj.

Libroservo de UEA



ESPERANTO EN RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1969, Unua Parto, p. 521. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ciutage

05.30-06.00 Warszawa, 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11995 kcs). I.P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
15.30-16.00 Warszawa, 42.11 m (7125 kcs), 25.42 m (11800 kcs).
22.30-22.55 Warszawa, 49.92 m (6010 kcs), 42.11 m (7125 kcs). I.P.

Dimanĉo

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
12.30-13.00 Pekino, 25.12 m (11945 kcs), 19.89 m (15080 kcs) I.
20.00-20.20 Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.42 m (11800 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
21.45-22.00 Manila, 25.17 m (11920 kcs). P. Far East Broadcasting Co., Box 2041, Manila, Filipinoj.
22.45-23.00 Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lundo

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs), I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua Sao Bento 245, Sorocaba (Sao Paulo), Brazilo.
12.05-12.15 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 16.86 m (17795 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
18.00-18.15 Stoke-on-Trent, 94.9 m Mcs (mod. frekv.). K.I. Radio Stoke, Cheapside, Hanley, Stoke-on-Trent (Staffs.), Britujo. (la kvaran lundon de la monato, de 18.00 ĝis 18.30; kelkaj programoj en la angla).

Merkredo

12.05-12.15 Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
13.45-14.00 Wlen, 203 m (1475 kcs). P. Radio Wlen, Argentinlerstr. 30a, Wlen IV, Aŭstrujo. (ĉiun alternan merkredon).
14.00-14.15 Stoke-on-Trent, kiel lunde.
23.05-23.30 Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo.

Ĵaŭdo

10.00-10.15 Manila. Kiel dimanĉe.
21.50-22.00 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 25.25 m (11880 kcs), 19.60 m (15305 kcs). P. (D-ro Baur).
23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1133 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.

Vendredo

20.00-20.30 Pekino, 45.32 m (6620 kcs), 45.17 m (6640 kcs), 42.37 m (7080 kcs), 40.43 m (9860 kcs). I.

Sabato

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.
12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.
14.30-14.40 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Cordoba 1331, Rosario (Santa Fe), Argentino.
20.00-20.30 Pekino. Kiel vendrede.
21.50-22.00 Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncata ĉiutaga programo prezentas "Anguleton por Esperantistoj" dum la jenaj nacilingvaj programoj:
— angla merkredo inter 11.00 kaj 11.25 per ondoj 41.99 m (7145 kcs), 31.01 m (9675 kcs);
— dana merkredo inter 15.30 kaj 15.55 per ondoj 48.90 m (6135 kcs), la saman tagon inter 19.30 kaj 19.55 per samaj ondoj, kaj dimanĉe inter 12.00 kaj 12.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs);
— finna sabate inter 20.00 kaj 20.30 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs);
— germana ĉiutage inter 07.30 kaj 08.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs);
— itala merkredo inter 11.30 kaj 12.30 per ondoj 42.11 m (7125 kcs) kaj 31.50 m (9525 kcs), la saman tagon inter 21.00 kaj 21.30 per samaj ondoj, kaj dimanĉe inter 10.30 kaj 11.00 per samaj ondoj;
— sveda marde kaj vendrede inter 20.30 kaj 21.00 per ondoj 200 m (1502 kcs), 50.04 m (5995 kcs), 41.18 m (7285 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 25.09 m (11955 kcs), merkredo kaj sabate inter 7.00 kaj 7.30 per samaj ondoj.

NOTO: La stacioj Bern, Pekino, Roma, Warszawa regule sendas senpagan programon de slaj elsendoj al petantoj.

NOVAJ PROGRAMOJ EL VARSOVIO

Niaj legantoj povos rimarki, ke la ĉi-supra listo de "anguletoj por esperantistoj" plilongiĝis; nun la dana, finna kaj sveda programoj ankaŭ entenas esperantlingvan rubrikon. Estus utile, ke ankaŭ la nacilingvaj redakcioj de la pola radio ricevu eĥon de slaj aŭskultantoj per leteroj kun komentoj kaj sugestoj. La sama adreso de la stacio validas, kun indiko de la koncernata lingvo.

La somera programo aperis; petu ĝin al la Pola Radio, kiu plezure tuj sendos ĝin al vi.

KALENDARO

por julio - januaro

Julio

- 30/6-13 Int. ferioj, Balatonszemes, Hungarujo
4-6 Int. renkontiĝo, Podebrady, Ĉeĥo.
5-10 Hispana kongreso, La Laguna, Tenerife
6-13 Baltmara semajno, Rostock, GDS
6-13 Somera universitato, Gyula, Hungarujo
12-27 Int. junulara renkontiĝo, Latina, Ital.
13-20 Kultura semajno de UFE, Grésillon
13-26 Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakujo
14-24 Naturamika renkontiĝo, Abaliget, Hung.
15-22 STELO-kongreso, Graz, Aŭstrujo
15-25 Int. turista kongreso, Szeged, Hung.
17-20 Kongreso de ELNA, Pittsfield, Mass.
18-20 Seminario en Sao Paulo, Brazilo
19-26 KELI-kongreso, Kiljava, Finnlando
20-26 Int. feriaj kursoj, Elsinoro, Danujo
20-3/8 Kulturaj-turismaj ferioj, Grésillon
22-25 Antaŭkongresa ekskurso, laga reg.
23-25 Antaŭkongresa ekskurso, Laponujo
26-27 Japana kongreso, Tokio
26-2/8 54-a Universala Kongreso, Helsinki
27-7/8 Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakujo

Aŭgusto

- 2-6 Oficiala postkongreso, Turku, Finn.
3-4 Lerneja konferenco, Helsinki, Finn.
3-6 Postkongresa ekskurso al Leningrad
3-8 SAT-kongreso, Novi Sad, Jugoslavio
3-10 TEJO-kongreso, Tyresö, Svedujo
3-11 Ferio-semajno, Krommenle, Nederl.
3-24 Kulturaj semajnoj, Grésillon, Fran.
7-11 Postkongresa ekskurso al Laponujo
9-10 Ornitologia semajnfino, Falsterbo, Sve.
10-16 Balta tendaro, Viljandi, Estonujo
10-20 Int. pedagogia seminario, Szeged, Hung.
24-30 Eŭropa ferio-semajno, Gwatt, Svisujo
24-7/9 Seminario por kursgvidantoj, Grésillon
30-2/9 Germ.-franca renkontiĝo, St. Martin, GDR

Septembro

- 13-18 Itala kongreso, Como
16-29 Int. ferioj, Miedzygórze, Polujo

Oktobro

- 19-25 Aŭtunaj feriaj kursoj, Aarhus, Danujo
24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
15 Zamenhof-Tago, Tago de la Esperanta Libro
27-3/1 Int. Seminario de GEJ, Germanujo
31 Kotizoj Universala Kongreso Vieno altiĝas

Januaro

- 3-7 Novzelanda Kongreso, Napier
4-8 Aŭstralia Kongreso, Perth

ELOKVENTO

En la latva ĵurnalo "Ĉina" (Batalo) aperas serio da raportoj pri vojaĝo de soveta ŝipo "Profesoro Zubov" en Antarkto. Sur la ŝipo troviĝas krom sovetaj sciencistoj ankaŭ franca grupo, survoje al esplorstacio. Pri la nivelo de la sciencaj interŝanĝoj sovetaj-francaj atestas la ĉi-suba ekstrakto:

".....Bedaŭrinde sur la ferdeko de 'Profesoro Zubov' neniu el niaj polusesplorantoj kontentige scipovas la francan. La francaj kolegoj ne trovas bonan interpretanton. La rusan kaj anglan lingvojn konas neniu el la francoj. La gvidanto de la glaciologa grupo, sola inter siaj samlandanoj, libere parolas germane. Tial la germana lingvo, kiun konas ankaŭ multaj sovetaj polusesplorantoj, restas la sola interliga kanalo. Fakte la pens-interŝanĝon tiel peradas du interpretantoj....."

La nescio de fremdaj lingvoj estas kaŭzo por diversaj amuzaj miskomprenoj.

Al la unua asistanto de la ŝipestro venis franca glaciologo Jean Beker. En unu mano li tenis plenan sitelon da akvo, en la alia — sufiĉe grandan ferpecon. Li malrapide metas la feron en la akvo-sitelon, poste ĝin eltiras, kaj tiun ĉi eksperimenton ankoraŭ ripetas. La asistanto tamen nenion komprenas. Ĉu al li estas eksplikata ia fizika regulo?

Oni alvokis du interpretantojn. Evidentiĝis la intenco de Jean Beker. Baldaŭ venos la ekvatoro, kaj tiam Neptuno ĉiujn ĵetos en profundan akvobasenon. Jean tute ne scipovas naĝi. En la akvo li samrapide subakviĝos, kiel la ferpeco en la sitelo. Ambaŭ objektojn li kunportis por klare demonstri sian senfortecon en la akvo. La unua asistanto de la ŝipestro do informu pri tio Neptunon mem kaj lian servistaron....."

PROVU

IMITI

LA



NOVZELANDANOJN

Novzelandanoj daŭre estas la plej diligentaj kolektoj de poŝtmarkoj por UEA. Kial? Ĉar oni organizis la laboron — sub gvido de s-inoj Rita Aagaard kaj Y.M. Canty. Se en ĉiuj landoj oni same organizus la kolektadon, UEA ricevus regule grandan financan subtenon.

En la maja "Esperanto" vi povis legi, ke UEA mem komencis vendi el la granda stoko da poŝtmarkoj. Por ke tiu stoko ne elĉerpiĝu kaj la vendado ne ĉesu, ni alvokas al ĉiuj kolektantoj por UEA daŭrigi kaj intensigi sian agadon. Ni serĉas ankaŭ novajn helpantojn! Ankoraŭ pluraj landoj tute ne estas reprezentitaj en tiu laboro. Plej efike estus, se ĉiuj imitus la novzelandanojn!

Oficiala informilo

N-ro 425, 1 junio 1969

UEA heredas pli

Kiam en la jaro 1965 mortis en Aŭstralio s-ro Arthur Maurice Hyde, UEA heredis laŭ lia testamento proksimume 21 500,— gld. Intertempe daŭris la pritrakto de la heredaĵo, kaj en aprilo ĉi-jara UEA ricevis ankoraŭ plian sumon el la heredaĵo Hyde: 4 170,91 gld. La nomo de s-ro Hyde jam eniris la Oran Libron de la Asocio.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Generala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de septembro neniuj membro protestas pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Britujo: Frank Brookes, Abergele; Ernest Bennett, Chorley. **Ceĥoslovakio:** Jiri Lihar, Mladá Boleslav; Jarmila Rybáčková, Pardubice; Josef Škorpil, Tábor. **Finnlando:** Taisto Aurela, Pori. **Francujo:** Jean Rousset, Bourg-de-Péage. **Germanujo:** Kurt Nissen, Flensburg; Otto Müller, Lemberg; Franz Walk, Straubing. **Hispanujo:** Joan Sala Campama, Sabadell. **Italujo:** Aldo Formaggio, Chiavari; Nunzio Pa-

risi, Trapani. **Japanujo:** Sasaki Hiroshi, Hiroŝima. **Jugoslavio:** Ševket Karanezi, Struzje. **Kanado:** George Moore, New Hamburg. **Pollando:** Franciszek Rostworowski, Minsk-Mazowiecki. **Tanzanio:** Albert Boddy, Dar es Salaam.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1969)

Britujo: Bournemouth (D kaj FD); South Shields. **Francujo:** Bourg-de-Péage. **Israelo:** Hercelija. **Nederlando:** Leiden (D). **Svedujo:** Östvall. **Usono:** San Francisco (VD).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Patera, s-ro Frantisek, Jiĉin, Ĉeĥoslovakio. Soares, s-ro Affonso, Rio de Janeiro, Brazilo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1969

255 Camarasa, s-ro E.A., Argentino. 256 Hubalek, s-ro J., Aŭstrujo. 257 Andreasson, s-ro B.; 258 Lindström, s-ro B.; 259 Stenström, f-ino S., Svedujo. 260 Calvert, s-ro E., Usono.

DONACOJ (Gld.)

Fondaĵo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Nederlando; Sadler, d-ro V., 25,—.

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

16-jara lernanto de teknika mezlernejo serĉas gekorespondantojn. Kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn. Sławomir Plesinski, Warszawa 12, Okecka 8/63, Pollando.

Gastfilinon (au pair) por knabinoj 10- kaj 7-jaraj, 15 septembro- 17 decembro minimume, serĉas ges-roj Martin, 7 Rochester Terrace, Edinburgh 10, Skotlando.

Serĉas gegvidantojn: Ĉina eksportisto deziras interamikiĝi kun geesperantistoj en Nederlando, Belgujo, Francujo, Italujo, Okcident-Germanujo, Hispanujo, Svislando, Svedujo, Danlando kaj Norvegujo, kiuj volonte gvidos kaj helpos lin en komerca kontaktado, kiam li vopaĝos al tiuj landoj por komerca celo. Skribu al s-ro Wong Ling Kai, Lun Fung Trading Company, G.P.O. Box 15747, Hong Kong.

Esperanto-Parolata (sesa eldono): tutmonda Adresaro por tuja parola uzo de Esperanto en komerco kaj turismo, 10 steloj aŭ 3,50 fr. frankoj: poŝtĉekkonto Maurice Rétot, Paris-1042 07 (Eldonejo Rétot).

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.



F-ino Kamelia Jonkova (flegistino), Neŭrologia kliniko, ĉe la medicina fakultato, Sofio 31, Bulgario, deziras korespondi pri ĉiuj temoj, sed precipe pri la psikologio de la bestoj.

Korespondanton en Brazilo? Skribu al Koresponda Servo de Brazila Esperantista Junulara Organizo, Caixa Postal 18 (ZC-00), Rio de Janeiro.

Francisko, kvinjara, havas ĝojon anonci la alvenon de Mikaelo en la verda familio Wermelinger, F-68-Buhl, Francujo.

Direkcio de internacia aŭtomobil-turisma ralio, Pribor, ĈSSR, aranĝos dum tagoj 14-19.VII.1969 internacian aŭto-vetkuradon tra la plej belaj regionoj en ĈSSR. Interesitoj skribu al supra adreso!

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Dumonata Internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de U.E.A.

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300).

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO- FONDAJO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj.

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al
Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852),
Piazza Duomo 4 — 48100 Ravenna (Italujo).

SOMERE, en FRANCA VALO de LUAR' (fr. LOIRE)

Belaj ekskursoj - Internacia etoso - Kulturaj
renkontiĝo - Esperanto-kursoj - Ekzamenoj -
Gajaj vesperoj

ESPERANTISTA KULTURDOMO

(Fondinto H. Micard)

Kastelo GRÉSILLON - 49 - BAUGÉ -
Francujo

20-a de julio — 3-a de aŭgusto:

KULTURAJ kaj INTERNACIAJ FERIOJ ...

Prelego de S-ro Major, profesoro pri lingvoj,
agregaciita de la Nov-Zelanda Universitato.

Temo: De Nov-Zelando al Japanujo, kaj tra Azio
al Grésillon: Spertoj pri lingvistiko, tekniko,
kaj... vojaĝoj.

Aliaj konataj prelegantoj partoprenos tiun
periodon.

Inter aliaj temoj: Konatiĝo de Centr-Okcidenta
Francujo.

3-a de aŭgusto — 24-a de aŭgusto:

KULTURAJ ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ

Esperanto-kursoj kaj ekzamenoj: Komencantoj.
Praktikantoj. Preparo al Pedagogia Atesto.

Bindado — Korbofarado — Inicado al teatro —
Paroladetoj — Filmoj — Kantoj.

24-a de aŭgusto — 7-a de septembro:

STUDPERIODO kaj SEMINARIO

por KURS- kaj GRUP-GVIDANTOJ, organizitaj
de U.F.E.

Geesperantistoj, unu el tiuj periodo perfekte
konvenas al vi!


Petu la kompletan programon, kondiĉojn, trafik-
horaron, je la ĉi-supra adreso. Rapide aliĝu!

Aarhus

La Internaciaj feriaj aŭtunaj Esperanto-kursoj
okazos 19.-25. de oktobro en la altlernejo JUNAĴ
HEJMOJ (tute moderna) en Aarhus, Danlando. Venu
por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta
rondo kaj dum tempo, kiam la proksimaj arbaroj
portas sian plej multkoloran veston. Prospekto
senpage havebla ĉe

L. Friis
Ingemannsvej 9,
8230-Abyhøj,
Danlando

LA NAŬZO



222 p.

15 × 21

broŝ.

11,70 gld.

Ekde aprilo 1970

D-ro Nassif Isaac kaj lia edzino faros rondvojaĝon
en Eŭropo, elmontrante diapozitivojn pri antikva
Egiptujo. Klubo kaj grupoj esperantistaj, kiuj
deziras inviti lin, povas aŭ persone kontakti lin
en la Kongreso aŭ skribi al li per adreso P.O. Box
1221, Cairo, Egiptujo, ekde oktobro 1969.

Eksterordinara romano de


Jean-Paul Sartre

en traduko de Roger Bernard

Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 3

Eldono de UEA

JUS APERIS



ANTOLOGIA LERNOLIBRO POR PERFEKTIGAJ KURSOJ KAJ MEMLERNANTOJ

W. Auld, Akademiano, prezentas en 30 lecionoj, kiujn li nomas "paŝoj", 30 literaturajn legaĵojn, kiujn la lernanto devas studi kaj analizi per entute 176 ekzercoj pri Esperantaj gramatiko, sintakso, stilistiko kaj redakto-arto.

La literaturaj legaĵoj (prozo, poezio, teatro, scienco) estas parte originalaj, parte tradukitaj (el la angla, aramea, bulgara, ĉeĥa, ĉina, hungara, pola, rusa, skota, sveda kaj turka lingvoj). La vortaro difinas 1.682 vortojn.

**TRIKOLORA KARTONA KOVRILO — 238 PAĜOJ KUN LISTO DE
KONSILITAJ ESPERANTO-LIBROJ, ADRESARO DE LA LANDAJ
ASOCIOJ DE UEA KAJ TEJO:**

PREZO: 2 US \$ aŭ egalvaloro

(Ĉiu volumo entenas rabatkuponon en valoro de 0,40 US \$, validan por aĉeti ekzempleron de "Fabeloj" de H. C. Andersen, en traduko de D-ro L. L. Zamenhof)

Eldonis: **HEROLDO**
DE ESPERANTO

Kongresu en ideala feriolando!
Feriu en ideala kongresurbo!
Partoprenu en la

40-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

en urbo Como - ĉe la fama lago
de la 13-a ĝis la 18-a de septembro 1969

- luksa kongresejo en historia "Vilao Olmo"
- interesaj kongresaj aranĝoj
- allogaj ekskursoj sur la lago kaj montoj
- teatra vespero en opera teatro
- kongresa balo, bankedo, vizitoj ktp.



Aliĝu tuj
(frutempa aliĝo
konsilinda)
Aliĝo senkotiza
por
eksterlandanoj

Kongresadreso:

ITALA ESPERANTO-KONGRESO

ĉe: Azienda Autonoma Soggiorno
22100 Como (Italio)

COMO ATENDAS VIN !

- ☆ Bonegaj loĝeblecoj en ĉiuklasaj hoteloj.
- ☆ Turista rondvizito de la urbo — Historiaj kaj artaj monumentoj el ĉiuj epokoj.
- ☆ Ĉe Vilao Olmo: kongresoj, artaj elmontroj, diversspecaj manifestacioj.
- ☆ Koncertoj de religia muziko en la antikvaj **Baziliko**j — Muzika Aŭtuno (septembro-oktobro).
- ☆ Ĉiuj sporteblecoj. Ŝnurfervojo al monto Brunate. Ekskurseblecoj. Ŝipaj kaj boataj servoj sur la lago.
- ☆ Spektaklo de akvoludoj el flosantaj lumigitaj fontanoj.



PORINFORME:

Azienda Autonoma Soggiorno e Turismo
22100 Como (Italio). Piazza Cavour

Oni korespondas en Esperanto